
(EN ESPERANTO)
ISSN 0032-4361 12 1993

中國報道

# EL POPOLA ĈINIO





Velkintaj lotusfloroj    Foto de **LIU SIGONG**

## INTER NI

Al mi plaĉis tradiciaj artikoloj en la rubriko "Laŭ Antikva Vojo al Tibeto". Precipe interesega priskribo de la Flava Rivero kaj la foto, kiu prezentas la marĉejon de la fonto de la Flava Rivero, devus esti plej interesa nuriara fotografaĵo.

Precipe valora por mi estis artikolo "Kien migris antikvaj hunoj" de Wu Wen. Sincere dirite, pri hunoj mi sciis ege malmulte. Kaj post la tralego de la "Historia Mistero" la mondo de hunoj fariĝis pli konata kaj proksima.

**Antanas Svildys**
(Litovio)

*En nia gazeto estas 21 rubrikoj, kiuj konigas al niaj legantoj la historion, kulturon, reformadon kaj Esperanto-movadon de Ĉinio.*

*Laŭ peto de niaj legantoj ni lanĉos en 1994 dek novajn rubrikojn. Ili estos:*

*"Ĉe Yangzi-rivero" raportas la ĝeneralan strategian dispozicion kaj projekton pri la pordomalfermo ĉe Yangzi-rivero kaj konigas lokajn ekonomiajn superecojn, solidan ekonomian bazon, idealan investan medion, avantaĝajn politikojn de la ĉina registaro, k.a.*

*"Ekonomie" prezentas la nunajn statojn, solvojn, tendencojn kaj perspektivojn de iuj gravaj problemoj en la ekonomia kampo de Ĉinio.*

*"Facetoj de la ĉina socio" raportas la ĉinan socian vivon en multaj flankoj, inkluzive de novaj moroj en reformado kaj ankaŭ anormalaj fenomenoj ekzistantaj en la socio.*

*"Ĉina kulturo" raportas kulturajn fenomenojn, ruinojn, filozofaĵojn, inventojn k.a. en la antikva Ĉinio.*

*"Sentencoj de filozofoj" prezentas maksimojn de antikvaj ĉinaj filozofoj.*

*"Bela Ĉinio" vidigas ĉinan pejzaĝon kun aparta karaktero, historiajn vidindejojn, mirindaĵojn de artistoj k.a.*

*"Mem provu" prezentas elementajn sciojn pri la ĉiutaga vivo.*

*"Amatoroj" konigas fruktodonajn amatorojn kaj ties kolektaĵojn.*

*"Sur scenejo" montras bildojn pri diversstilaj popolaj dancoj kaj tradiciaj teatroj de Ĉinio.*

*"Voĉo de E-istoj" temas pri artikoloj pri lernado, disvastigo, esplorado kaj uzado de Esperanto.*

**La Red.**

MONATA GAZETO ELDONATA DE ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. KESTO 77. BEIJING. ĈINIO

# ENHAVO


2 *INTER NI*

4 Mao Zedong kaj la Yan'an-a Esperanta Ekspozicio

6 Monumento de la ĉina sporto

10 Ĉinio provas sciencan nutran dieton

12 Neforgesebla vizito en Rusio

14 Por vigliĝo de la ĉina E-movado

16 *ESP-NOVAĴOJ*

17 *POR KOMENCANTOJ:*

Mi kaj miaj katetoj

20 *VERDIGO EN ĈINIO:*

Reprosperigo de la arbaroj en nordorienta Ĉinio

24 *ITINERO PROPONITA:*

Itinero por ĉigong-o kaj korposanigo

25 *ARTOJ DE ĈINIO:*

Tradicio, esploro, evolucio

28 Baleto en Ĉinio

30 *MOROJ DE ĈINAJ NACIOJ:*

Montvilaĝo de keĝja-oj

33 *AMUZOJ*

36 Ĉu konfuceanismo estas religio?

38 *REFORMADO:*

Iom pri makroreguligo de Ĉinio

39 La festo Nadun de tuoj

40 Pri sanprotekto de maljunuloj en Ĉinio

42 Urĝa savo sur glaciejo

44 Koliero el sorga tigo (Novelo)

46 Profunda amo

47 Forigu rubon en la spaco

48 *KURANTAJ AFEROJ*

50 *EL ĈINAJ GAZETOJ*

*SUR LA KOVRILO:*

Wang Junxia kaj aliaj sportistinoj en la Sepa Tutlanda Sportkunveno

Foto de **Da Wei**

2 Velkintaj lotusfloroj

18 Unuaklasaj lernantoj de elementa lernejo

34 Bestaj specimenoj

*FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:*

Ortodoksa preĝejo en Karlovy Vary, Ĉeĥio


Strateto en vilaĝo de norda Nederlando

*SUR LA DORSKOVRILO:*

Huangshan-monto en aŭtuno


## LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Heilongjiang-provinco (p. 20)
2. Guangdong-provinco (p. 30)
3. Fujian-provinco (p. 30)
4. Minhe-a Huj- kaj Tu-nacia Aŭtonoma Gubernio (p. 39)
5. Ninghai-gubernio (p. 46)



HOU ZHIPING:

# MAO ZEDONG KAJ LA YAN'AN-A ESPERANTA EKSPOZICIO

*Mao Zedong ne estis esperantisto, tamen siatempe li subtenis Esperanton per sia surskribo dediĉita al la esperantistoj en Yan'an (Jan'an), kio kuraĝigis ĉinajn esperantistojn en la malfavora situacio kaj eĉ antaŭenpuŝis la postan E-movadon de Ĉinio. En la nuna jaro estas la 100-a datreveno de lia naskiĝo kaj la 54-a datreveno de lia surskribo. Ĉi-sube ni aperigos la artikolon memore al tiu granda personulo.*

**La Red.**

YAN'AN en nordokcidenta Ĉinio estis sankta loko de la ĉina revolucio. Ĝi estis bazloko, kie Mao Zedong gvidis la ĉinan popolon en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Subtenate de li, la tiea E-movado fariĝis tre vigla.

## LA E-MOVADO DE YAN'AN EN ĜERMADO

La Shaanxi(Ŝenŝji)-Gansu-Ningxia(Ningŝjia)-a Limregiono, kie situas la urbo Yan'an, estis kompare postiĝinta regiono en la ĉina historio. Antaŭ la 30-aj jaroj tie ne estis E-movado. Post la komenciĝo de la Kontraŭjapana Rezistmilito iuj esperantistoj venis tien kaj la E-movado ekestis.

La ĉinaj komunistoj, gvidataj de Mao Zedong, subtenis ĉiujn patriotojn kaj progresemajn junulojn en ties aktivado favore al la batalo, kun la celo starigi la kontraŭjapanan nacian unuecfronton. E-movado ludis gravan rolon en la progresema kultura movado de Ĉinio. Kompreneble, la ĉinaj komunistoj alte taksis ĝin.

Helpate de la limregiona registaro, famaj esperantistoj funkciigis Esperanto-kurson en la Ĉina Popola Kontraŭjapana Milit-politika Kolegio, Nacisava Asocio de la Kultura Rondo de la Limregiono kaj Arta Instituto de Lusin. La kursanoj lernis en malfacilega situacio. Pro blokado far la malamikoj estis malfacile trovi paperon kaj plumon. Tiuokaze ili skribis sur ŝtonplato aŭ sur tero. Por eviti la bombadon far malamikaj aviadiloj ili iam devis lerni en proksimaj montoj.

## LA UNUA E-ORGANIZAĴO EN LA LIBERIGITA REGIONO

La junuloj, kiuj venis el la regiono okupata de la malamikoj, fariĝis poste aktivuloj de la ĉina E-movado. Aprile de 1938, ili preparis sin por fondi E-organizaĵon kun la motivo: Esperanto estas ideala komunikilo inter la subpremataj popoloj kaj malfortaj nacioj en la mondo, precipe en la batalo kontraŭ faŝismo Esperanto ludas gravan rolon en internacia propagando ĉu en Ĉinio ĉu en Hispanio. Ĝi okupas ankaŭ gravan lokon en la nacidefenda kulturo de Ĉinio. Tial, prezentiĝis antaŭ ili la urĝa tasko fondi esperantistan ligon por plifortigi la unuiĝon, plivastigi la E-movadon kaj akceli la disvolviĝon de nacidefenda kulturo.

Tion, kion deziris la Yan'an-aj esperantistoj, subtenis la Nacisava Asocio de la Kultura Rondo de la Limregiono. Post kelka tempo la Jan'an-a Esperantista Ligo, la unua E-organizaĵo de la liberigita regiono, fondiĝis la 6-an de majo 1938. Kaj leviĝis la E-movado de la limregiono kun Yan'an kiel la centro.


## SURSKRIBO DE MAO ZEDONG POR LA ESPERANTA EKSPOZICIO

Post fondiĝo de la Jan'an-a Esperantista Ligo, famaj esperantistoj, inkl. de Huang Nai kaj Zhuang Dong (Ĝŭang Dong), venis al Yan'an. Por grandigi la influon de Esperanto sur la armeanojn kaj popolanojn de la limregiono kaj akceli disvolviĝon de la tiea E-movado, ili decidis okazigi Esperantan ekspozicion en Yangjialing (Jangĝjaling) de Yan'an la 15-an de decembro 1939, okaze de la 80-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Samideanoj de la ligo skribis al prezidanto Mao Zedong pri la aranĝo kaj petis de li surskribon por la ekspozicio. Mao Zedong sendis alporti sian surskribon nelonge poste. La surskribo estis farita la 9-an de la sama monato. Per ĝi li denove certigis sian subtenon de Esperanto. Li diris: "Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata."

La surskribo orientis ne nur la E-movadon de Yan'an, sed ankaŭ la postan E-movadon de Ĉinio. Gvidate de ĝi, la ĉinaj esperantistoj longtempe batalis kontraŭ la agresa milito, por defendi la mondpacon kaj konstrui la novan Ĉinion.

## DISVOLVIĜO DE LA E-MOVADO EN YAN'AN

La Esperanta ekspozicio inaŭguriĝis la 15-an de decembro 1939.



La surskribo de prezidanto Mao Zedong por la Yan'an-aj esperantistoj

En ĝi estis eksponataj centoj da objektoj, kiaj ĉinaj kaj alilandaj Esperantaj libroj kaj gazetoj, lernokajeroj, propagandaĵoj kaj tradukoj de Yan'an-aj esperantistoj, korespondaĵoj de ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj, artikoloj de ĉinaj esperantistoj pri la kontraŭjapana nacisava kampanjo ktp. La ekspozicio konigis la rolon de nia lingvo en la internacia propagando kaj kultura interŝanĝo.

La ekspozicion rekompencis plena sukceso. Iuj rigardantoj anoncis sin por lerni Esperanton. Por adaptiĝi al la nova situacio la Jan'an-a Esperantista Ligo starigis fakojn edukan kaj esploran, organizan kaj kontaktan, konsultiĝan pri korespondа instruado, redaktan kaj eldonan kaj tradukistan grupon. Kaj krome, ankaŭ fondiĝis E-klubo.

Siatempe la ligo laboris per Esperanto sub tre malfacilaj kondiĉoj. Malgraŭ tio, ĝiaj membroj propagandis Esperanton inter la armeanoj kaj popolanoj de la limregiono per raporto, varieteo kaj gazetaro. Ili funkciigis Esperanto-kurson aŭ starigis E-rondon en la Kultura Asocio, milit-politika kolegio, arta instituto, Akademio de Naturaj Sciencoj, Akademio de Sociaj Sciencoj, Ĉina Virina Universitato kaj Limregiona Hospitalo. Kaj plie, ili donis korespondan instruadon konstante. Historiaj materialoj diras, ke la ligo nombris pli ol 300 membrojn.

Pere de la revuo "Jan-ana Esperantisto" ili prezentis la situacion de la Kontraŭjapana Rezistmilito en Ĉinio kaj kontraŭjapanajn politikojn praktikatajn de la Komunista Partio de Ĉinio, prikantis la bravan rezistadon far la armeanoj kaj popolanoj en la kontraŭjapanaj bazlokoj, malkaŝis la krimojn de faŝistoj en Ĉinio, diskonigis la internacian batalon kontraŭ faŝismo kaj rekomendis alilandajn literaturajn verkojn.

Yan'an-aj esperantistoj faris sian meriton ankaŭ en la senanalfabetiga kampanjo de la limregiono. Samideanoj Lü Ji (Lju Ĝji), Zhuang Dong kaj Li Mian ne nur respondecis pri la laboro de la Limregiona Asocio de Nova Skriblingvo, sed ankaŭ gvidis esperantistojn en la kampanjo de latiniga skriblingvo. Ili diris: "Kiu ne lernas la novan skriblingvon, estos analfabeto enlande, kaj kiu ne lernas Esperanton, estos analfabeto internacie." Tiamaniere ili bone kombinis E-movadon kun la kampanjo de la nova skriblingvo.

Post venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito plejparto de la esperantistoj iris al la fronto de la Popola Liberiga Milito, pro kio malvigliĝis la E-movado en Yan'an. De la lastaj dek jaroj denove vigliĝas la tiea E-movado. Observante la surskribon fare de prezidanto Mao Zedong, la Yan'an-aj esperantistoj diligente lernas nian lingvon kaj aktive propagandas ĝin. Ili fondis sian Esperanto-asocion kaj reeldonas la revuon "Jan-ana Esperantisto". Krome, ili Esperante korespondas kun ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. Ili kredas, ke Esperanto faros novan kontribuon al la reformado kaj pordomalfermo de Yan'an en la nova tempo. ■

# Monumento de la ĉina sporto

Teksto de **ZHANG QINGZHEN** Fotoj de **DA WEI**

POR revui kaj akceli la ĉinan sporton, septembre de 1993 okazis en Pekino la Sepa Tutlanda Sportkunveno de la Ĉina Popola Respubliko. Tiu ĉi grandioza sportkunveno atingis plej okulfrapajn sukcesojn, kompare kun la antaŭaj ses tutlandaj sportkunvenoj. Ĝi estas rigardata kiel monumento en la historio de la ĉina sporto.

## RIĈA RIKOLTO EN LA KONKURSOJ

La sportkunveno enhavis 43 sportobranĉojn de gimnastiko, naĝado, atletiko, piedpilko k.a., kun 472 oraj medaloj. Antaŭ la konkursoj en Pekino, kiuj daŭris 12 tagojn, la konkursoj de iuj sportobranĉoj jam okazis en aliaj lokoj de Ĉinio. En Pekino intense konkursis 4 228 sportistoj de 45 delegacioj el diversaj partoj de la lando.

En la sportkunveno kvar sportistoj kvarfoje kreis kvar mondajn rekordojn; 18 sportistoj 43-foje superis 21 mondajn rekordojn; 4 sportistoj 4-foje egaligis 3 mondajn rekordojn; 54 sportistoj 93-foje kreis 34 aziajn rekordojn; 61 sportistoj 143-foje superis 66 aziajn rekordojn; kaj 130 sportistoj 273-foje kreis 117 landajn rekordojn. Plej okulfrapa estas tio, ke ĉinaj atletinoj foje refoje rompis mondajn rekordojn, kaj tio vekis ĝeneralan atenton de la monda sportista rondo.

En la sportkunveno Liaoning-provinco gajnis la unuan lokon ne nur en la totala sumo de oraj medaloj, sed ankaŭ en tiu de teamaj poentoj. Post ĝi sekvis Guangdong-provinco kaj Ŝanhajo.

## ĜOJIGAJ SUKCESOJ EN ATLETIKAJ KONKURSOJ

Kiel ĉefa sportobranĉo de la Olimpiaj Ludoj, atletiko markas la sportan nivelon de lando. Pasintece, Ĉinio ne havis sian lokon en la mondaj atletikaj konkursoj kaj ĉinaj sportistinoj atingis sukcesojn nur en tre malmultaj sportobranĉoj, kia ir-konkurso. Sed ĉi-foje ĉinaj atletinoj gajnis mirindajn sukcesojn unu post alia.

En la unua tago de la atletikaj konkursoj sportistinoj Wang Junxia (Ŭang Ĝjunŝja) de Liaoning kaj Zhong Huandi (Ĝong Hŭandi) de Yunnan respektive per 29'31"78 kaj 30'13"74 superis la mondan rekordon de la virina 10 000-metra kuro, kiun kreis Kristiansen de Norvegio per 30'13"74 julie de 1986. La 11-an de septembro sportistinoj Qu Yunxia (Ĉju Junŝja) kaj Wang junxia respektive per 3'50"46 kaj 3'51"92 superis la mondan rekordon de la virina 1 500-metra kuro, kiun kreis Kazankina de eks-Sovetunio per 3'52"47 aŭguste de 1980. La 12-an en la antaŭ-finala konkurso de la virina 3 000-metra kuro sportistinoj Wang Junxia, Qu Yunxia, Ma Liyan (Ma Lijan), Zhang Linli (Ĝang Linli) kaj Zhang Lirong (Ĝang Liĵong) de Liaoning superis la mondan rekordon kreitan de Kazankina antaŭ naŭ jaroj per 8'22"62. En la sekvanta tago Wang Junxia kaj Qu Yunxia ankoraŭfoje superis la mondan rekordon en la finalo de la sama sportobranĉo. Ĉar la trejnisto de tiuj sportistinoj de Liaoning havas la familian nomon Ma, tial oni nomas ilin "armeo de la familio Ma". Trejnisto Ma Junren malkaŝis al ĵurnalistoj, ke lia teamo ŝuldas sian sukceson al selektado de talentuloj, scienca trejnado kaj naturaj nutraĵoj. Ekzemple, antaŭ ol rompi la mondajn rekordojn, Wang Junxia manĝis testudon pezan je 4.40 kg.

Sportistino Liu Xiaomei (Liŭ Ŝjaŭmej) de Sichuan (Siĉŭan) per 11"19 kaj 11"02 dufoje superis la azian rekordon de la virina 100-metra kuro, kiun tenis dum 23 jaroj sportistino Ji Zheng (Ĝji Ĝeng) de Taiwan (Tajvan), konata kiel "azia antilopo". Sportistinoj Ma Miaolan de Zhejiang (Ĝeĝjang) kaj Liu Dong de Liaoning respektive superis la azian rekordon de la virina heptatlono kaj tiun de la virina 800-metra kuro. Iliaj rezultoj enviciĝis inter la unuaj ses lokoj de la mondo en la diritaj sportobranĉoj.

Antaŭ 1-2 jaroj oni tute ne kuraĝis atendi, ke Ĉinio enviciĝu inter la mondaj fortaj landoj de



Sportistoj, kreintaj kaj superintaj mondajn rekordojn, akiris honoran sportan medalon de la ŝtato.

atletiko. Tiam oni opiniis, ke en la atletikaj sportoj estas tre malfacile por azianoj rivali kun mondnivelaj sportistoj pro fizikaj kondiĉoj. Sed la sukcesoj en tiu ĉi sportkunveno konvinkis, ke venos en la proksima estonteco la tago, en kiu ĉinaj atletoj fariĝos fortaj rivaloj.

## LA DUA PRINTEMPO POR LA ĈINAJ NAĜISTOJ

Naĝa trejnisto el Kazaĥstano diris post la konkurso de naĝado de la sportkunveno, ke al la venontjara Azia Sportkunveno li gvidus nur naĝistojn el sia lando, ĉar neeblus por ĝi sukcesi en rivalo kun ĉinaj naĝistinoj.

Lia ŝerco spegulas la progreson de la ĉinaj naĝistinoj. Ni prenu por ekzemplo: pasintjare en la finalo de la virina 100-metra naĝado de la Olimpiaj Ludoj, tiu, kiu naĝis kun rapideco 1'1"4, gajnis la okan lokon, sed en la antaŭfinalo de la sportkunveno, tiu, kiu naĝis kun rapideco 1'1"0, ne povis eniri en la finalon.

Laŭ statistiko, en la sportkunveno ĉinaj sportistinoj okupas la ĉi-jaran unuan lokon de la mondo en la 50-metra liberstila naĝado, 100-metraj papili-naĝadoj, 100- kaj 200-metraj brustonaĝadoj kaj 200- kaj 400-metraj miksnaĝadoj. Se adicii la rezultojn de la unuaj kvar sportistinoj, ili povos rompi la mondan rekordon de la 4×100- kaj 4×200-metraj liberstilaj stafetaj naĝadoj kaj 4×100-metra stafeta miksnaĝado. Krome, ankaŭ la rezultoj de la ĉampionoj en la aliaj virinaj konkursoj de naĝado plejparte enviĉiĝis inter la unuaj tri lokoj de la mondo.

Estis atentinde, ke en la sestagaj konkursoj de naĝado en la sportkunveno ĉiutage aŭdiĝis la novaĵo, ke famaj genaĝistoj estas venkitaj de novicoj. Novembre de 1987, naĝistino Zhuang Yong (Ĝuang Jong) gajnis la oran medalon per 56"22 en la finalo de la virina 100-metra liberstila naĝado en la Sesa Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio kaj famiĝis poste ankaŭ en la Olimpiaj Ludoj. Ĉi-foje en la konkurso de la sama naĝobranĉo ŝi gajnis nur la arĝentan medalon per 54"73. En la konkurso de la virina 100-metra papili-naĝado sportistino Qian Hong (Ĉjan Hong), ĉampionino de la Olimpiaj Ludoj, eĉ estis ekster la unuaj ok lokoj. Fama sportisto Shen Jianqiang (Ŝen Ĝjanĉjang) de Ŝanhajo, honorita kiel "ĉiama verda arbo" de la ĉina naĝista rondo, gajnis neniun medalon en sia forta naĝobranĉo. Fakte tiuj ĉi famaj genaĝistoj jam atingis sian nivelon. Ili estis venkitaj nur pro tio, ke novicoj sufiĉe rapide progresis.

Post la konkurso la ĉeftrejnisto de la ĉina naĝista teamo s-ro Chen Yunpeng (Ĉen Junpeng) diris kun emocio: "Krom la nomoj de Zhuang Yong, Qian Hong kaj aliaj tri sportistinoj, en mian notlibron estas enskribitaj ankaŭ la nomoj de Dai Guohong (Daj Gŭohong), Le Jingyi (Le Ĝingji) kaj aliaj ok novicoj. Jam alvenis la dua printempo de la ĉina naĝista rondo."

## GRANDA PROGRESO EN HALTERLEVADO

En la konkursoj de halterlevado 27 homoj 58-foje rompis landajn kaj aziajn rekordojn. La malnova azia rekordo de la virina kategorio de 76 kg estis 255 kg, sed la nova rekordo kreita en la sportkunveno estas 290 kg. Tio markis, ke la virina halterlevado de Ĉinio atingis mondan nivelon. Altnivelaj kaj intensaj estis ankaŭ la konkursoj de la vira halterlevado kaj 20 halterlevistoj 48-foje superis 25 aziajn rekordojn.

El la konkursoj de gehalterlevistoj videblis, ke multe progresis halterlevistoj de alta kategorio en tekniko, precipe en tiu de ŝirlevado. La halterlevistoj de Guangdong, Hunan kaj Hubei bone posedas teknikon kaj havas superecon en malaltaj kategorioj, dum la halterlevistoj de norda Ĉinio havas superecon en altaj kategorioj. La juĝistoj opiniis, ke ĉiuj halterlevaj teamoj rimarkinde progresis en selektado de talentuloj, intensigo de sanprotekto kaj trejnado por pligrandigi la fizikan forton.

## PROMESPLENAJ NOVICOJ

En la ĉi-foja tutlanda sportkunveno multaj novicoj brave konkursis kaj akiris ĝojigajn sukcesojn.

Inter ili plej elstaras Dai Guohong. Ŝi plurfoje venkis famajn sportistinojn kaj gajnis tri orajn kaj du arĝentajn medalojn. En la konkurso ŝi ne ĉiam naĝis plej antaŭe, tamen ŝi preskaŭ ĉiufoje plene strebis per mirinda rapido por la lastaj 40-50 m kaj la unua atingis la finon.

En la konkurso de la virina




En la finalo de la 110-metra vira barierkuro



La piedpilka konkurso inter la teamoj de Pekino kaj Liaoning. La lasta gajnis la oran medalon en la konkurso.

En la teamaj duonfinalo kaj finalo de la virina gimnastiko 11-jara gimnastino Kui Yuanyuan (Kuj Jŭanjŭan) faris neniun mismovon. En la individua konkurso sur la ekvilibra trabo ŝi faris kvar sinsekvajn transkapiĝojn kun plena sukceso. Ĉi-foje, ŝi gajnis la kvaran lokon en la konkurso, tamen ŝi estas multe promesplena.

plonĝado ne multe konata 12-jara plonĝistino Wang Rui (Ŭang Ĵuj) venkis ĉampioninon de la Olimpiaj Ludoj kaj gajnis la oran medalon.

En la konkurso de la vira aerprema pistolo juna pafisto Xiao Jun (Ŝjaŭ Ĝjun) per 582 trafoj egaligis la mondan rekordon. Li komencis ekzerci sin per pafado nur antaŭ du jaroj.

## ALTE TAKSINDAJ DIFERENCOJ

La sportkunveno multe superis la antaŭajn en skalo kaj iris de la komenco ĝis la fino en bona ordo. La spektakla grupa prezentado en la malfermo karakteriziĝis per granda nombro da partoprenantoj kaj elegantaj movoj. Ĉio ĉi spegulis bonan socian medion kaj montris la kapablon de la organizantoj okazigi grandan sportkunvenon.

Tamen ni bone scias, ke Ĉinio estas malforta en multaj sportobranĉoj de la Olimpiaj Ludoj, kiaj luktado, kanuado, jaktado kaj kajakado. Ankaŭ la rajdarto de Ĉinio devas iri sufiĉe longan vojon por atingi la internacian nivelón.

Aparte rimarkindas, ke granda diferenco estas inter la sportistoj kaj sportistinoj de Ĉinio. La virinaj teamoj multe superis la virajn en la sportobranĉoj de piedpilko, flugpilko kaj atletiko. En la konkursoj de atletiko multaj atletinoj superis mondajn kaj aziajn rekordojn, sed tre malmultaj atletoj renovigis aziajn rekordojn. En la konkursoj de naĝado aperis malpli da viraj novicoj ol virinaj, kaj ne troviĝis naĝisto, kiu kapablis defii mondan rekordon. Oni ĝojas pri la sukcesoj de la ĉinaj sportistinoj kaj ankaŭ esperas, ke la ĉinaj sportistoj penege ekzercos sin por atingi internacian nivelon kiel eble plej frue. ■




Sportistinoj en longdistanca kuro

Sportistino Le Jingyi, gajninto de la ora medalo de la 100-metra virina liberstila naĝo



Sportistino de arta gimnastiko en konkurso



BAI RU:

# Ĉinio provas sciencan nutran dieton

"MANĜAĴOJ estu diversaj; la delikataj miksiĝu kun la krudaj; tri manĝoj aranĝiĝu racie; manĝado estu modera; dolĉaĵo kaj graso enpreniĝu malmulte; drinkado moderiĝu kaj salo estu manĝita en limigita kvanto." La nomita diet-orientilo por la ĉinoj en la 90-aj jaroj estas enskribita en la antaŭ nelonge publikigitan "Programon pri Reformado kaj Disvolvado de Ĉina Manĝaĵa Strukturo en la 90-aj Jaroj", kune ellaboritan de laborantoj de la registaraj departementoj pri agrikulturo, planado, higieno, financo, forstokulturo, akvoutiligo kaj enlanda komerco. Ĝi estas la unua dokumento pri nutra dieto oficiale publikigita de la ĉina registaro depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

## POST LA SOLVO DE LA PROBLEMO PRI MANĜADO KAJ VESTADO

Manĝaĵo estas la bazo de la ekzisto kaj evoluo de la homaro. En la pasintaj dekoj da jaroj Ĉinio faris multon por solvi la problemon pri manĝado kaj vestado. Nun la taga pokapa provizkvanto de varmo, proteino kaj graso de ĉinoj proksimiĝas al tiu de la mondo. Post kiam la problemo estis fundamente solvita, la ĉina registaro difinis novan direkton de manĝaĵa produktado. Anstataŭ al sola pliiĝo de produktokvanto, oni turnas sian atenton al altprodukto kaj bonkvalito. La manĝaĵoj devas esti bonkvalitaj, diversaj kaj duonprilaboritaj.

La manĝaĵa produktado kaj konsumado ŝanĝiĝas. Sekve de tio, evidentiĝas la neraciaj fenomenoj en la produkta strukturo, prilaborado kaj kvalito de manĝaĵoj, kaj ankaŭ en la strukturo de nutra dieto kaj konsumaj kutimoj de ĉinoj. Tial nepre necesas reformi kaj reguligi ilin. En la nuna manĝaĵ-produkta projekto de la ŝtato oni akcentas naturan riĉfonton, investon kaj produktajn kapablon kaj celon, sed certagrade neglektas projekti kaj reguligi la harmonian disvolviĝon de la produktado kaj konsumado de manĝaĵoj, kun la celo altigi la manĝaĵ-konsuman nivelon de la popolo, kaj precipe ŝanĝi ties bezonon de la nutra dieto. Estas urĝa bezono ellabori oficialan dokumenton, kiu temas pri la bona kombiniĝo de manĝaĵa produktado kaj konsumado kun scienca dieto, faciligas konduki la disvolviĝon de manĝaĵa produktado kaj reguligon de manĝaĵa strukturo kaj gvidas la loĝantaron en la manĝaĵa konsumado.


En la nuna situacio de Ĉinio, konsultinte internaciajn konvenciojn kaj materialojn, la dokumento prezentas la gvidan penson kaj fundamentajn celojn pri la disvolviĝo de ĉinaj manĝaĵoj en la 90-aj jaroj, kaj listigas la rimedojn kaj organizajn garantiojn por realigi la celojn.

## LA CELOJ DE MANĜAĴA KONSUMADO

La gvida penso pri la disvolviĝo de ĉinaj manĝaĵoj en la 90-aj jaroj estas: Persisti en la harmonia disvolviĝo de la produktado kaj konsumado de man-

En vendejo de nutroriĉaj manĝaĵoj





Laborantoj de la Pekina Manĝaĵa Instituto en esplorado

ĝaĵoj. Laŭ la bezono de nutraĵo kaj konsumado pluapaŝe disvolvi manĝaĵ-produktadon, plene ekspluati diversajn riĉfontojn de tero kaj manĝaĵo, disvolvi manĝaĵ-prilaboran industrion kaj produktadon de manĝaĵoj agrikulturaj, forstokulturaj, brutobredaj, flankokupaj kaj fiŝkaptaj kaj alte taksi ĉioampleksan aranĝon de produktado, prilaborado kaj provizado de manĝaĵoj; laŭ la principo de "nutro, higieno, scienco kaj racio" heredi la bonajn tradiciojn de dietaj kutimoj de la ĉina nacio, ĉerpi avangardajn spertojn de eksterlandanoj, reformi kaj reguligi la manĝaĵan strukturon kaj konsumajn kutimojn de la loĝantaro, por ke grandamplekse altiĝu la totala nivelo de manĝaĵa konsumado kaj nutra dieto de la ĉina popolo kaj estu trovita nova vojo de la manĝaĵa disvolviĝo konforme al la stato de Ĉinio.

Laŭ la fundamenta postulo, ke je la fino de la kuranta jarcento la ĉina popolo ekvivu bonhavan vivon, en 2000 la celoj de manĝaĵa konsumado kaj nutra dieto de la ĉina popolo estos:

La taga pokapa provizo de ĉefa nutraĵo atingos la averaĝan nivelon de la mondo: 2 600 grandaj kalorioj da varmo, 72 gramoj da proteino (triono estos bonkvalita) kaj 72 gramoj da graso.

La jara pokapa konsumo de manĝaĵo plimultiĝos. La ĉina popolo preferas vegetalan manĝaĵon al la animala. Oni devas plimultigi la konsumon de animalaj manĝaĵoj. Por diri konkrete, 213 kg. da greno (interalie 8 kg. da faboj), 25 kg. da viando, 10 kg. da ovoj, 6 kg. da lakto, 9 kg. da akvoproduktaĵoj, 23 kg. da fruktoj, 120 kg. da legomoj, 8 kg. da vegetalino kaj 8 kg. da sukero.

Laŭ la supre diritaj celoj tiam Ĉinio produktos 520 milionojn da tunoj da greno (pli ol kvarono estos brutonutraĵo), 39 milionojn da tunoj da viando, 14.3 milionojn da tunoj da ovoj, 9.1 milionojn da tunoj da lakto, 18 milionojn da tunoj da akvoproduktaĵoj, 32.5 milionojn da tunoj da fruktoj, 156 milionojn da tunoj da legomoj, 10.4 milionojn da tunoj da vegetalino kaj 10.4 milionojn da tunoj da sukero.

Ĉinio havas grandegan teritorion. La disvolviĝo de ekonomio en diversaj lokoj estas malsama. Tial, la manĝaĵa disvolviĝo en diversaj lokoj estas malsama. En 2000 la bezono de varmo kaj proteino en la manĝaĵoj de la urbanoj kaj kamparanoj estos kontentigita, sed la proporcio de animala manĝaĵo de la kamparanoj pli rapide grandiĝos, dum la manĝaĵa strukturo de la urbanoj ŝanĝiĝos. La diferenco de manĝaĵa konsumado inter la urbanoj kaj kamparanoj pli-malpli malgrandiĝos.

La ĉemaraj regionoj, grandaj kaj mezgrandaj urboj transiros de bonhaveco al riĉeco, kaj la manĝaĵa strukturo multe ŝanĝiĝos. La malriĉaj regionoj, fundamente solvinte la problemon pri manĝado kaj vestado, proksimiĝos al bonhaveco.

## STREBO AL MANĜAĴA DISVOLVIĜO

La "Programo pri Reformado kaj Disvolvado de Ĉina Manĝaĵa Strukturo en la 90-aj Jaroj" temas pri la politiko kaj rimedoj por realigi la celojn, kiel starigi la sistemon por protekti kampojn, perfektigi la sistemon por makroreguligi la produktadon kaj vendadon de greno sub la socialisma merkata ekonomio, por garantii la stabilan kreskon de produktokvanto de greno; laŭ la merkata bezono pligrandigi la produktadon de grenaj kaj ekonomiaj plantoj kaj sendependigi la brutonutraĵan industrion.

Energie disvolvi brutobredadon kaj entreprenadon de akvoproduktaĵoj. Je la fino de la kuranta jarcento, la procento de porkoviando malaltiĝos kaj konsistigos 70% de la viandoprovizo, tiu de kortobirda viando altiĝos ĝis 18% kaj tiu de bovaĵo kaj ŝafaĵo ĝis 12%. La procento de akvoproduktaĵoj altiĝos kaj konsistigos 20% de la animalaj manĝaĵoj;


Energie disvolvi la prilaboradon, konservadon kaj transportadon de manĝaĵoj. Konformigi la manĝaĵan prilaboradon al la manĝaĵa konsumado. Laŭ lokaj kondiĉoj disvolvi la unuapaŝan prilaboradon de manĝaĵaj materialoj kaj profundan prilaboradon de manĝaĵoj. Konvene entrepreni la prilaboradon de krudaj grajnoj. Laŭeble rapide starigi kompletan, racian kaj modernan sistemon de manĝaĵa industrio, por ke la procento de prilaboritaj manĝaĵoj kresku de 30% en la nuna tempo al 40% de la totala sumo de manĝaĵoj;

Plifortigi higienan kaj kvalitan kontroladon de manĝaĵoj. Disvastigi produktadon kaj aplikadon de hipotoksa insekticido. Disvastigi la sciencan uzadon de kemisterko;

Perfektigi administran sistemon por kontroli la nutran staton de malsamaj homamasoj en malsamaj lokoj kaj doni koncernajn informojn kaj sciencajn bazojn por plibonigi la nutran staton. Preni kiel gravan punkton de laboro la ŝanĝon de serioza subnutra stato de la malriĉaj regionoj kaj la regionoj, kie oni suferas de serioza malsano pro manko de nutro, kaj ellabori rimedojn por la sanprotekto de virinoj, infanoj kaj maljunuloj. ■



En la hejmo de s-ino Elena (la tria de maldekstre), fratino de s-ro Titajev (la kvara de maldekstre)



Ĉinaj kaj rusaj esperantistoj sur la Ruĝa Placo

ZHANG MEIZHI:

# Neforgesebla vizito en Rusio

MAJE tri-membra delegacio de El Popola Ĉinio vizitis Vladivostokon, Habarovskon, San-Peterburgon kaj Moskvon de Rusio.

Kiam nia trajno alproksimiĝis al la stacidomo de Grodekovo, landlima urbo de Rusio, ni vidis tra la palisaro altastaturan s-ron Aleksandr Titajev kaj s-ron Andrej, kiuj longe atendis nin. S-ro Aleksandr Titajev estas afabla kaj fidinda. Oni ameme nomas lin Saŝa. Kiel respondeculo de E-klubo "Pacifiko" en Vladivostoko, li kun Andrej kaj s-ino M. Tanja partoprenis en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao, Ĉinio kaj konatiĝis kun niaj delegacianoj s-roj Wang Jianbing (Ŭang Ĝjanbing) kaj Liu Fengyi. Kiel malnovaj amikoj, ili sentis grandan ĝojon ĉe la renkontiĝo.

Vladivostoko estis fama milithaveno kaj antaŭ kelkaj jaroj ĝi estis fermita urbo. Kadre de la haveno ankrumis diversgrandaj ŝipoj. La urbo pura kaj bonorda, alkroĉiĝas al montodeklivo kaj rigardas al maro. La hotelo Amuro, kie ni loĝis, sidas ĉe la maro, kiel giganta ventumilo. Starante sur la balkono, ni povis vidi senliman maron kaj aron post aro da mevoj. Karesate de zefiro kaj humida aero, ni estis tre ĝojaj.

Multaj samideanoj de Vladivostoko bonvenigis nin en la klubo. Inter ili estis kaj malnovaj amikoj kaj novaj konatoj kaj eĉ ĉina esperantisto laboranta en la urbo. En Esperanto ni interbabilis pri interesaj temoj. S-ro Wang Jianbing parolis kun s-ino M. Tanja pri okazintaĵoj post la pacifika kongreso de Qingdao; rusa esperantisto s-ro Aleksej rakontis al Liu Fengyi pri la historio de budhismo; kaj la edzino de s-ro Andrej, kun la plej freŝa numero de EPĈ en la mano, diris al mi, ke ŝi tre ŝatas bildojn kaj precipe tiujn de artaĵoj presitajn en la revuo kaj reabonos ĝin.

La E-klubo "Pacifiko" lokiĝas en la oficejo de la Komitato "Paco", kie laboras s-ro Aleksandr Titajev. Tie ni havis ŝancon ĝui multajn rarajn materialojn kaj informiĝis pri ilia aktivado kaj kontaktiĝo kun diverslandaj esperantistoj kaj E-organizaĵoj. En la biblioteko de la urbo ni foliumis historiajn materialojn pri E-movado, kiaj la poŝtkarto de UK en 1913 kaj Esperantaj eldonaĵoj en diversaj periodoj. De la materialoj ni informiĝis, ke komence de la kuranta jarcento ekfunkciis E-organizaĵo en la Ekstrema Oriento.

La E-klubo "Pacifiko" havas ĉ. 50 membrojn kun malsamaj profesioj. Tamen ili havas komunan deziron amikiĝi per Esperanto. Por tiu celo ili kunsidas foje ĉiusemajne.

En iu bela vespero ni kaj la tieaj esperantistoj kunsidis en la Muzeo de Suhanov. Ĝi estas antikva duetaĝa domo. Sur la larĝa tablo de la salono estis samovaro, biskvitoj kaj bombonoj. 20 samideanoj partoprenis la kunsidon. Dum la kunsido la gastigantoj regalis nin ankaŭ per kanto kaj diapozitivo. La diapozitivo, kiu temas pri la pasintjara vojaĝo de s-roj Aleksandr Titajev, Andrej kaj M.Tanja en Ĉinio, estas farita de ili mem. En la projekciado Saŝa foje-refoje faris tre interesan klarigon.

Eksonis piano kaj ĉiuj estis altiritaj de la muziko. S-ro Stanislav N. Mitskevich kaj s-ino Galina Anvarovna prezentis rusajn popolajn kantojn kaj s-ro Wang Jianbing ĉinan popolan kanton. En gaja atmosfero la kantadon sekvis ĉiuj partoprenantoj kaj per tio pasigis belan vesperon.

De Vladivostoko al Habarovsko ni trajne veturis tutan nokton. En Habarovsko estas malmultaj esperantistoj. Ni renkontiĝis nur kun juna esperantisto Sergej.

Nun li lernas en altlernejo. Li decidis daŭre okupiĝi pri Esperanto post la diplomiĝo.

En San-Peterburgo estas multaj esperantistoj. La E-klubo estas en la plej supra etaĝo de malnova domo en ĉirkaŭurbo. Sur la muroj pendas Esperantaj bildoj kaj poŝtkartoj kun aparte okulfrapa verda stelo. La gastiganto loĝigis nin en la ĉambro kaj ni sentis nin kvazaŭ hejme. Gastiganto fraŭlino Anna diris al ni, ke per Esperanto ili organizis la Turisman E-firmaon "Universo", kaj la ĉambro servas ankaŭ kiel ĝia oficejo. Ili funkciigas la turisman firmaon ekskluzive kun la celo kolekti monon por E-movado.

Ĉinaj kaj rusaj esperantistoj en la klubo "Espero"



En San-Peterburgo ni amikiĝis kun iuj samideanoj, inter kiuj estas s-ino Valeria. Infanece ŝi lernis nian lingvon de sia patrino kaj nun ŝi vivas emeritan vivon. Tamen ŝi ĉiam zorgas pri Esperanto kiel antaŭe. Kelkajn minutojn post kiam ni atingis la klubon, ŝi venis por nin bonvenigi. Dum nia restado s-ino Valeria kaj s-ro Andrej akompanis nin en vizito de la Vintra Domo, Somera Domo, parko kaj stadiono kaj ĝuado de baleto kaj koncerto. Ŝi parolas Esperante tre flue. Dum nia rigardado ŝi senlace klarigis al ni kion ni vizitis. Dank'al ŝia klarigo, ni profundigis nian komprenon pri la majestaj domoj kaj percepton de tradicia arto kaj ĉarma pejzaĝo. Samtempe kun tio, ni ĉinaj esperantistoj estas edifitaj de ŝia entuziasmo pri Esperanto kiel ligilo de amikeco.

La lasta etapo por nia vojaĝo estis Moskvo. Ni restis en la urbo nur tri tagojn kaj havis la ŝancon renkontiĝi kun membroj de Esperanta grupo. Nin kortuŝis la partopreno de tri blinduloj el ili. Membroj de nia delegacio Liu Fengyi kaj Wang Jianbing raportis pri EPĈ kaj E-movado en Ĉinio. En la renkontiĝo ĉiuj partoprenantoj intime interparolis. Post la renkontiĝo, akompanate de s-ro Viktor Arolvoiĉ, prezidanto de la Rusia Esperantista Unio, kaj aliaj, ni rigardis la domon, kie lernis nia Majstro d-ro L.L. Zamenhof, kaj grandan straton de Moskvo.

En Moskvo ni loĝis hejme de juna esperantisto-inĝeniero s-ro Mihailo. Antaŭ kvin jaroj li komencis lerni Esperanton. Sur la bretaro en lia domo estis metitaj multaj Esperantaj libroj kaj gazetoj, inkluzive tiujn eldonitajn de Ĉinio. Li tre interesiĝas pri la Esperanta movado en Ĉinio. Pro la amikeco al la ĉinaj esperantistoj li konsentis esti peranto de nia revuo EPĈ.

Finiĝis nia vojaĝo. Ni por eterne tenos en nia memoro la amikajn kontaktojn kun rusaj esperantistoj. ■

WANG HANPING:

# Por vigliĝo de la ĉina E-movado

## — Pri la kunsido de sekretarioj de provincaj E-asocioj en Chengde


LA Ĉina E-movado havas historion de pli ol 80 jaroj. En la lastaj pli ol 10 jaroj ĝi progresis rapide. En diversaj lokoj de la lando oni funkciigis multe da E-kursoj korespondaj, radioelsendaj kaj televidaj, eldonis multajn gazetojn kaj librojn kaj fondis 28 provincajn E-asociojn.


Tamen la ĉina E-movado iris ne ĉiam glate. En la lastaj jaroj la movadon trafis malfaciloj: mankas al E-organizoj monrimedoj, malmultiĝis esperantistoj altnivelaj kaj fervoraj, kaj pluraj kabeis. Tiu ĉi stato malfaciligas funkciigon de E-asocioj, kaj sekve la ĉina E-movado trovas sin en malalta tajdo. Ĉinio komencis praktiki la sistemon de la socialisma merkata ekonomio. Kiajn rimedojn oni devas preni por E-movado en tiu ĉi nova situacio? Tio estas severa problemo ĝenanta diverslokajn E-asociojn.

Ĝuste en tiu situacio, la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis la kunsidon de sekretarioj de provincaj E-asocioj en la urbo Chengde, Hebei-provinco, de la 18-a ĝis la 21-a de aŭgusto. La ĉefa temo de tiu kunveno estas: kiel plifortigi la E-asociojn, funkciigi E-asociojn kaj puŝi la ĉinan E-movadon al nova etapo sub la kondiĉoj de la socialisma merkata ekonomio. 44 partoprenantoj el 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj varme diskutis pri tiu temo surbaze de la praktikado de siaj propraj lokoj.

Disvastigo de Esperanto ĉiam estas baza kaj grava afero por nia E-movado. Hodiaŭ en la mondo multaj homoj el pli ol 100 landoj povas paroli la artefaritan lingvon, kreitan de d-ro Zamenhof antaŭ 100 jaroj, kio ĉefe estas rezulto de la senĉesa penado de plurgeneraciaj esperantistoj. Nun en Ĉinio troviĝas pli ol kvarcent mil esperantistoj. Plejparto el ili lernis Esperanton komence kaj meze de la 80-aj jaroj. En Ĉinio pli kaj pli multaj homoj eklernis Esperanton pro la disvastigo. Retrorigardante tion la ĉeestantoj de la kunsido konas, ke unuflanke disvastigo de Esperanto estas longperioda laboro, ĉu en Ĉinio, ĉu en aliaj landoj, la nombro de geesperantistoj estas ankoraŭ tre malgranda kompare kun la totala nombro de la loĝantoj, tial en longa periodo disvastigado ankoraŭ estas necesa kaj tre grava por nia movado; aliflanke, en la nuna situacio ne sufiĉa estas la sola disvastigo por disvolvi la ĉinan E-movadon. Kiel supre menciite, la ĉina E-movado alfrontas multajn malfacilojn, tial plifortigi memkonstruon de E-organizoj kaj disvolvi E-komunumon fariĝis unua tasko de la ĉina E-movado. Ju pli perfekta estas memkonstruo de E-organizoj, des pli grandaj la organizaj fortoj kaj des pli granda la intereso de ekstera mondo pri ili, kaj pli multaj lernos, uzos Esperanton. Disvolvo de E-komunumo kaj disvastigo de Esperanto povas atingi la saman

S-ro Chai Zemin, vicprezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", skribas sian nomon por junaj esperantistoj.





Partoprenantoj de la kunsido

celon laŭ malsamaj vojoj, ambaŭ povas progresigi E-movadon. La partoprenantoj atingis jenajn komunajn konojn pri konstruo de E-komunumo.

Unue, oni devas plifortigi konstruon de esperantistaro kaj Esperantaj fakoj, apliki Esperanton en diversaj fakaj kampoj. En Ĉinio troviĝas multe da esperantistoj, tamen ili plejparte estas komencantoj. Koncerne konstruon de esperantistaro oni devas altigi, antaŭ ĉio, ilian lingvonivelon. Samtempe, ĉar ili sin okupas pri diversaj laboroj kaj inter ili troviĝas specialistoj, se ili aplikas Esperanton en siaj fakaj laboroj, tio povas ne nur plifortigi la konstruon de Esperantaj fakoj, riĉigi Esperantan kulturon, sed ankaŭ konigi al ili la funkcion de Esperanto kaj longe teni ilin en Esperantujo. Iuj ĉinaj E-organizoj kaj esperantistoj faris multon tiuflanke, ekz. la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj eldonas la revuon "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", prof. Io Chou en entomologio, prof. Chen Yuan en lingvistiko kaj Cui Zhiqin (Cuj Ĝiĉin) en medicino akiris rimarkindajn atingojn. En Ĉinio jam fondiĝis la Ĉina Junulara E-Asocio kaj Fervojista E-Asocio. Nun oni preparas sin por fondi medicinan, vejĉi-an, filatelan, instruistan kaj aliajn fakajn E-asociojn.

Due, oni devas okazigi diversajn aktivadojn pere de Esperanto por la ekonomia konstruado, internacia interŝanĝo kaj mondpaco. En la lastaj jaroj iuj E-asocioj organizis aktivadojn en kultura, scienca, teknika, ekonomia, komerca, turisma kaj aliaj kampoj laŭ siaj lokaj kondiĉoj kaj fakaj bezonoj. La Ŝanhaja E-Asocio plurfoje okazigis internaciajn simpoziojn kaj kunsidojn kaj vigligas la kulturan interŝanĝon kun aliaj landoj. La Esperantaj televidfilmoj "Hodiaŭa Chengde" kaj "Chengde kaj Esperanto" faritaj de la Chengde-a E-Asocio estis premiitaj respektive en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto kaj la 78-a UK. La televidfilmoj plifamigis la urbon Chengde, sidejon de la imperiestra somerumejo de Qing-dinastio. Kaj pro tio la Chengde-a E-Asocio tiris al si grandan atenton de la publiko. Faktoj montris, ke ju pli granda la socia efiko de E-aktivadoj, des pli multa priatento kaj subteno de tuta socio al E-organizoj, kaj des pli rapide disvolviĝos nia E-movado.

Trie, oni devas starigi entreprenojn por akumuli fonduson por disvolvi E-movadon konforme al lokaj kondiĉoj. Antaŭe lokaj E-asocioj estis helpataj de financaj departementoj. Nun tiu monhelpo preskaŭ nuliĝis pro manko de kapitalo por la ekonomia konstruado. Pro manko de monrimedoj E-organizoj kaj E-movado alfrontas grandan defion. Nun la registaro permesas ke societoj povas funkciigi entreprenojn, kio donis al E-organizoj ŝancon por disvolvi sin. Pluraj E-asocioj fondis entreprenojn kaj akiris certan ekonomian efikon, kio faris necesajn kondiĉojn por funkciigo de E-asocioj kaj disvolviĝo de E-movado. La Kantona, Shenyang-a, Yangzhou-a kaj Zaozhuang-a E-Asocioj starigis kompaniojn pli frue, kaj la E-movado en tiuj lokoj ankaŭ statas pli bone. Tial oni devas laŭeble gajni monon por E-movado.

Kvare, oni devas heredi sindonemon de esperantistoj kaj disvolvi la kolektivan superecon de E-organizoj. Sindonemo estas bona tradicio de E-movado. La nobla idealo de Esperanto interligas diversajn E-organizojn kaj geesperantistojn, kiuj havas malsamajn naciecojn, religiojn kaj profesiojn. Oni devas disvolvi tiun superecon, plifortigi interkontakton kaj kunlaboron, kaj helpi unu la alian. Se ni tiel faros, nia afero certe progresos senhalte. ■

# ESP-NOVAĴOJ

● De la 21-a ĝis la 23-a de aŭgusto okazis en Xinxiang (Ŝinŝjang) la 1993-a Simpozio de la Henan-a Esperanto-Ligo. La simpozio ricevis 12 disertaĵojn kaj faris Esperantan oratoran konkurson "Mi Amas la Flavan Riveron". La Xinxiang-a E-Asocio estis elektita kiel avangarda Esperanta societo kaj akiris la Verdstelan Pokalon. Tio estas la sesa fojo por ĝi akiri tian honoron.

● De la 1-a ĝis la 4-a de aŭgusto okazis en Dandong, Liaoning-provinco, la 3-a konferenco pri la strategio de la ĉina E-movado. En ĝi partoprenis 43 e-istoj el Pekino, Yunnan, Henan, Shandong, Jilin (Ĝjilin) kaj Liaoning. En la konferenco oni diskutis pri la jeno: E-organizoj devas rapide perfektiĝi, senĉese disvolvi aktivadon kun socia influo kaj servigi Esperanton al la reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio.

● De la 12-a ĝis la 16-a de aŭgusto la Ĉina Societo de Esperanto-Instruado en Superaj Lernejoj okazigis, en la fama turisma urbo Chengde nordoriente de Pekino, sian trian simpozion por diskuti pri la instrua metodiko de Esperanto kiel dua fremda



En la simpozio de la Henan-a Esperanto-Ligo

lingvo en superaj lernejoj. La simpozio ricevis 11 disertaciojn, el kiuj 9 estis voĉlegitaj kaj varme diskutitaj. Okaze de la simpozio la membroj de la societo ricevis po unu ekz. de la ĵus aperinta n-ro 2 de la organo "Esperanto en Superaj Lernejoj", kiu enhavas ĉ. 10 prelegojn pri Lusin kaj Esperanto, kompilon de mezgradaj lernolibroj ktp. kaj ankaŭ po unu ekz. de "Instrua Programo de Esperanto kiel Dua Fremda Lingvo en Superaj Lernejoj", kiun oni longe atendis. Por pli profunde esplori la metodikon de Esperanto kiel dua fremda lingvo, la societo decidis daŭrigi diskutadon pri la sama temo en la venonta simpozio.

● La 45-a IFEF-kongreso okazis de la 6-a ĝis la 12-a de junio 1993 en Cervia, bela itala banurbo ĉe Adriatiko. 500 gekongresanoj el 23 landoj renkontiĝis dum la inaŭguro. La 13-an okazis en Predappio la inaŭguro de la arta ceramikaĵa tabulo — "Scalea Esperanto", kun ĉeesto de la urbestro kaj prezidanto de IFEF.


● S-ro May Bijleveld, FD de UEA en Rio de Ĵanejro, ellaboris agadprojekton por kunigi ekologojn kun Esperanto, nome "Plano por pliverdigi la verdulojn". Interesatoj bonvolu kontaktiĝi kun li per la adreso: S-ro May Bijleveld, Rua Santa Alexandrina 481, apt. 606 20261-230 Rio de Ĵanejro, Brazilo.

● Esperanto-Redakcio de Pola Radio iniciatis novan programon "Esperanto-banko de lingvaj eraroj", kiu ligiĝas kun la kolektado de tipaj eraroj ripetiĝantaj en interparoloj kaj presitaj tekstoj, ekz. en gazetoj. La redakcio kolektos ilin kaj pritraktos en siaj lingvaj rubrikoj aŭdigataj en ĵaŭdo je 15:30 h. Se vi memoras tiajn erarojn, bonvolu sendi la frazon al la redakcio. La adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, P.O. Box 46, Pollando.

En la 45-a IFEF-kongreso



En la inaŭguro de la arta ceramikaĵa tabulo "Scalea Esperanto"



# Mi kaj miaj katetoj

SE vi volas havi katon kaj scii, kiel ŝanĝiĝos via vivo pro la besteto, mi rakontu al vi mian sperton en katobredado.

Mi bredis 39 katojn. La kapoj de tiuj kvarpieduloj estas plenaj de diversaj ruzaĵoj kaj intrigoj. Ili estas pli saĝaj ol mi, jen kial mi ŝatas ilin.

La katoj aranĝas sian vivon laŭ la principo de laŭebla komforto. Kiam ili volas manĝi, ili tuj manĝas; kiam iii volas promeni, ili tuj eliras. Foje ili restadas ĉe vi por ricevi vian prizorgon, foje ili volas resti solaj por meditadi. Ili ĵaluzas, se vi prizorgas kaj karesas aliajn bestojn. Ili malŝatas polvon, fiodoron, malbonajn manĝaĵojn, bruon kaj neatenditan gaston. Via malfrua hejmenreveno aŭ via longa vojaĝo maltrankviligas ilin, sed ili mem ofte forestas por pluraj tagoj kaj neniam maltrankviliĝas pro vi.



La plej granda talento de katoj estas tio, ke ili ĉiam pretendas, ke ili estas pravaj. Ĉu vi maltrankviliĝas, ĉu vi koleras, ili restas senzorgaj promenante ĉirkaŭ vi. Ili ofte ŝajnigas sin mutaj kaj senhelpaj kompatinduloj. Sed ĉiu ajn memrespekta kato, kiu povas miaŭi, povas komprenigi vin, kion ĝi deziras. Ĝia bleko signifas, ke ĝi volas manĝi; ĝia alia bleko signifas, ke ĝi volas eliri por promeni; kaj ĝia tria bleko ŝajne demandas vin, ĉu vi vidas ĝian ludilon rato en la ĉirkaŭaĵo. Unuvorte, katoj havas multajn vortojn facile distingeblajn. Se kato opinias, ke ĝia kompreno estas utila por ĝi, ĝi emas bone kompreni vin.

Katoj havas bonan memoron kaj bone taksas la memoraĵon. Mi iam bredis du katojn. Dank' al mia prizorgo ili havis varman hejmon. Foje mi vojaĝis eksterlanden kaj konfidis ilin al mia amiko, kiu havas luksan domon. Reveninte de la vojaĝo, mi estis senpacienca por revidi la katojn. Kiam mi venis al mia amiko kaj milde vokis ilin, ili montris surprizon, ŝajne dirante: "Ho ve, revenas la malriĉulo. Ni tuj for de li!" Kaj efektive ili forkuris. Ili timis reveni al mia mizera loĝejo en la kamparo. Sed fine ili vole nevole reaperis kaj ludis kun mi malnovajn distraĵojn kaj diskrete reciprokis kun mi rememoron pri la pasinteco. Sed kiam mi estis refoje forironta, ili denove malaperis. La amiko skribis al mi, ke eble la katoj akiris hortabelon de trajnoj, ke ili revenis nur post kiam la trajno veturis for.

La plej saĝa kaj emocia el la ruzaĵoj de kato estas tio, ke ĝi donacas raton al sia mastro. Sed kiam via kato prezentas al vi raton, vi fariĝos tute alia kaj ĉiam volonte servos al ĝi. ■



Instruistino disdonas lernolibrojn al novaj lernantoj.

# Unuaklasaj lernantoj de elementa lernejo

Teksto kaj fotoj de EPĈ-raportisto

La 1-an de septembro ĉiujare komenciĝas nova semestro de ĉinaj lernejoj.

Matene infanoj iras al lernejo. Inter ili aparte okulfrapas elementlernejanoj en freŝaj uniformoj. La unuaklasaj lernantoj venas al lernejo, akompanate de sia familiano. Kompreneble, por ili la lernejo estas fremda.

Kiel kutime, ĉiu lernejo okazigas tiutage solenan inaŭguron, en kiu oni ludas la muzikon de la nacia himno, hisas nacian flagon, donas taskon de la nova semestro kaj kuraĝigas la lernantojn por diligenta lernado. En tiu varma atmosfero komenciĝas la nova vivo de la unuaklasaj lernantoj.

"Ekde nun vi estas lernanto de elementa lernejo."



Infanoj venis en lernejon, akompanate de siaj familianoj.







Unuaklasaj lernantoj

Reprezentanto de novaj lernantoj parolas en la inaŭguro.



Antaŭ la inaŭguro de la nova semestro



# Reprosperigo de la arbaroj en nordorienta Ĉinio

Teksto de **SUN PIWEN**

Fotoj de **YAN JIN** kaj **CUI CHUN**



Ligno transportota aliloken

ĈINOJ iam fieris pri siaj arbaroj en Heilongjiang- (Hejlongĝjang)-provinco, nordorienta Ĉinio. La arbaroj etendiĝis sur Malgranda Xing'an(Ŝing'an)-, Zhangguangcai(Ĝangĝuangcaj)-, Laoye- kaj Wanda-montaroj. Ili kovras entute 26.4 milionojn da hektaroj. Ili konsistigas 14% de la totala areo de ĉinaj arbaroj. La tieaj lignaj rezervita kvanto, produktokvanto kaj arbara areo okupas la unuan lokon de Ĉinio. Laŭ statistiko, en la lastaj 40 jaroj, oni transportis de tie al diversaj lokoj de Ĉinio lignon de ĉ. 400 milionoj da kubmetroj, kaj donis al la ŝtato 1.5 miliardojn da juanoj kiel imposton, egala al 2.2 obloj de mono investita de la ŝtato en la sama tempo.

## ARBARO NE ESTAS MAGIA VAZO

Tie estas fekunda tero, prosperas ruĝaj pinoj, fraksenoj, piceoj, abioj kaj aliaj 200 specoj da arboj. Tie verdas stepoj kun areo de ĉ. 4.7 milionoj da hektaroj. En la loko vivas tigroj, cervoj, ursoj, aproj, zibeloj, linkoj kaj aliaj 500 specoj de animaloj, kiuj konsistigas 54% de animalaj specoj de Ĉinio. Tie densas pli ol 2 000 specoj da sovaĝaj vegetaloj de la glacimezvarma zono, el ili estas 120 specoj da altvaloraj drogherboj, kiaj ginŝengo, astragalo, ganodermo (*Ganoderma lucidum*) kaj skizandro (*Schizandra*). Tie produktiĝas ankaŭ mielo, fungo, orelfungo k.a.

Tamen, la primitiva arbaro ne estas neelĉerpebla kiel magia vazo. Pro senbrida rabado de cara Rusio kaj japanaj agresantoj en la pasinteco kaj perturbo inter la arbohakado kaj arbokulturo en la lastaj 40 jaroj, la primitivaj arbaroj plejparte perdiĝis, escepte de tiuj en kelkaj naturaj rezervejoj.

La statistiko de la Ĝenerala Arbar-industria Buroo de Heilongjiang montris, ke la totala ligna rezervokvanto kaj arbokovrita areo de la ŝtato ĉiuj malpliiĝis, precipe la ligna rezervokvanto de la maturiĝintaj arbaroj reduktiĝis de 700 milionoj da kubmetroj en 1949 al 166 milionoj da kubmetroj en 1993. Nuntempe inter la 40 ŝtataj arbaradministrejoj de la provinco, iuj ne havas arbaron taŭgan por tuja hakado.

Grandkvanta hakado detruis la ekologian medion. En la unua periodo de la ekspluatado Tangwang-rivero trapasanta la urbon Yichun (Jiĉun) estis tre klara, sed poste, pro senbrida hakado de arboj ofte okazis montaj superakvegoj kaj sablo plimultiĝis en la riverakvo. Oni opiniis, ke la ebenaĵoj Sanjiang kaj Songnen estas grava grena bazo de Ĉinio. Se oni volas ĝin bone gardi, antaŭ ĉio oni devas bone protekti la tieajn arbarojn.

## ESPERO DE ARBARKULTURA REPROSPERIĜO

Nun komenciĝis la rekonstrua projekto de arbaroj. La Forstumejo Jiugongli sub la Daijiang-a Arbarkultura Buroo jam faris sian unuan paŝon en tiu ĉi kampo.

Ĝi efektivigis la forstumadon de individua kaj kolektiva laŭkontrakta respondeca sistemo en la lokoj de la forhakita ŝtata arbaro. Post 6 jaroj la lokoj fariĝis denove verdaj kaj viglaj. De tio profitis kaj la ŝtato kaj kolektivoj kaj individuoj. Ĉion oni nomas modelo Jiugongli kaj en tio oni vidis la





Cervobredejo en arbaro

esperon de arbarkultura reprosperiĝo.

10 jarojn antaŭe la Hejiang-a Arbarkulturejo estis preskaŭ dezerta.

Somere de 1981 s-ro Jia Yupu, ĵus veninte labori tie kiel respondeculo, decidis rekonstrui la arbaron per siaj propraj manoj. Li kaj lia edzino iris labori sur monto kunportante manĝaĵojn, instrumentojn kaj arbidojn. Ilia ago kuraĝigis la ordinarajn laborantojn, nur en 5 jaroj (1984-1989) ili kulturis arbaron sur 93 000 hektaroj, egalan al la totala areo de la plantitaj arbaroj konservitaj en la antaŭaj 30 jaroj.

Por arbarizi la teron la Heilongjiang-aj arbaradministrejoj donis grandan helpon al kultivado de arbidoj kaj arbarkulturo. En 1992, en la provinco estis 437 arbid-kultivejoj kun areo de 20.8 milionoj da hektaroj kaj 168 fiksaj instalaĵoj de ŝpruca irigacio, kies tuboj longas entute je 682 000 metroj. Ili konstruis ankaŭ kanalojn kun longeco de 513 000 metroj. Dank' al ĉio ĉi tio oni povas irigacii la plantojn en la sekegeco kaj dreni superakvon. Nuntempe ili havas 80 600 hektarojn da bonspecaj arbaroj. La areo de plantitaj arbaroj en Heilongjiang atingis 2.045 milionojn da hektaroj.

## STARIGO DE GRANDA ARBARKULTURO

En la lastaj 15 jaroj ĉiuj arbaradministrejoj de Heilongjiang, sin liberiginte de ununura entrepreno en arbohakado, ellaboris la strategion pri starigo de sinteza utiligo kaj plurkampa entreprenado.

Observante tiun strategion, la Ĝenerala Arbar-industria Buroo de Heilongjiang kaj ĝiaj branĉoj fondis 1 295 produktajn bazojn de plurkampa entreprenado kun kelkcent specoj de produktaĵoj, kies kemi-industriaj produktaĵoj, paperpasto, papero, lignaj platoj, montaj kromproduktaĵoj kaj aliaj havas 23 seriojn, kiuj vendiĝas en 23 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de Ĉinio kaj en Eŭropo, Ameriko, Japanio, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj, Sudorienta Azio k.a. Tio multe akcelis la ekonomian disvolviĝon de la arbarkulturejoj. Profitante de la najbareco kun Rusio, ili kune kun Rusio kaj aliaj ŝtatoj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj starigis 21 kunlaborajn programojn, faris komercajn kontraktojn kun la totala sumo de ĉ. 60 milionoj da svisaj frankoj kaj fondis eksterlande 16 entreprenojn.

Dank' al la plurkampa entreprenado realiĝis en Heilongjiang-aj arbarkulturejoj sinteza ekspluatado de monto, rivero, kampo, arbaro kaj vojo, kune disvolviĝas agrikulturo, mineksplutado, brutobredado kaj fiŝkaptado. La Xinqing-a Arbaradministrejo ĉe piedo de la Malgranda Xing'anmontaro starigis fabrikon de sojfabolakta pulvoro kun jara produktokvanto de 1 000 tunoj. Ilia sojfabolakta pulvoro kun marko "Paro da trezoroj" farita el suko de betulo, lakto kaj bonkvalita sojfabo estis patentita de la ŝtato. Kaj iuj arbaradministrejoj produktas sufiĉe da viandaĵo, ovo, fiŝo, legomo kaj brutonutraĵo por sia propra bezono.

La disvolviĝo de la plurkampa entreprenado ne nur garantiis la rapidan rekonstruon de arbaroj, sed ankaŭ plibonigis la vivkondiĉojn de arbarkulturistoj, kiuj diris: "Nia arbaradministrejo devas fari grandan kontribuon al la ŝtato." Kulturi arbarojn kaj protekti ilin nun okupas la unuan lokon en ilia vivo. ■





Parto de la arbaro sur la Malgranda Xing'an-montaro

Rivereto en arbaro



Arbido-kultivejo







Arbohakado

Kulturado de ginsengoj





# Itinero por ĉigongo kaj korposanigo

de **GUAN LI**

TURISMO celas ne sole distriĝon, iuj el niaj itineroj akcentas korposanigadon. La nuna itinero estas por ĉigongo kaj korposanigo.

La prezentata itinero daŭros 12 tagojn. En la unua tago vi havos en Ŝanhajo kurson pri la ĉina medicino, ĉigongo kaj masaĝo kaj viziton en la Ŝanhaja Ĉinmedicina Instituto.

La tradicia ĉina medicino havas longan historion kaj iuj terapioj havas mirindan efikon. Ni prenu ĉigongon kiel ekzemplon. Ĝi estas rigardata kiel miraklo, vekas intereson ĉe pli kaj pli multaj homoj. La itinero ne estas longa, sed kredeble vi perceptos la efikon de ĉigongo.

Ĉigongo havas multajn ekzerco-metodojn. Mi proponos al vi facilan metodon konvenan por turistoj. En la tria tago post via alveno vi partoprenos en matena ĉigong-ekzercado borde de Huangpu-rivero en Ŝanhajo. Ĉiumatene multaj venas al la riverbordo por sin ekzerci per ĉigongo sub direktado de ĉigong-istoj. En la unuhora leciono vi ellernos kompletan metodon de ĉigong-ekzerco. Tio metos por vi bazon en via estonta ekzercado de ĉigongo. Se vi fartos nebone, ĉigongisto aŭ masaĝisto venos helpi vin.

Poste vi trajne veturos al Hangzhou, unu el la dek plej preferataj pitoreskejoj de Ĉinio. Tie la aero estas freŝa, pejzaĝo bela, la Okcidenta Lago estas ĉarma. Malproksime de la lago ondetas kontinuo da montoj, kaj ĉirkaŭ la lago viciĝas sveltaj salikoj kaj florantaj persikarboj. Tie kaj tie en verdaĵoj kaŝiĝas pavilonoj kaj palafitoj. La medio estas tre taŭga por ĉigong-ekzercado. Por ĉigong-ekzercado oni devas sin izoli de ĉiuj bruoj kaj forgesi sin mem kaj fandi sin en la naturon. La bela medio de la Okcidenta Lago helpos vin veni en tian animstaton por komenci la ekzercadon.

Ĉiumatene, kiam vi restos en Hangzhou, vi povos promeni tuj apud la lago kaj ekzerciĝi sub direktado de ĉigong-istoj. Post ekzercado mi akompanos vin en vizito al diversaj vidindejoj, ekzemple la Templo Lingyin. Ĝi estas unu el la dek famaj budhismaj temploj de Ĉinio, konstruita en la 326-a jaro. La ĉefa konstruaĵo en la templo estas la Mahavira Halo en alto de 33 metroj. En la halo estas statuo de Bodisatvo Skanda skulptita el sola trunko de kamforarbo, kaj la statuo de Ŝakjamunio, 33 metrojn alta, estis kunmetita el 24 pecoj de kamforarba ligno. Maljunaj arboj ombras la templon, ke la grandioza antikva konstruaĵo aspektas pli impona.

La Okcidenta Lago estas ĉirkaŭita de montoj en tri flankoj. Ĉirkaŭ la lago viciĝas la dek famaj vidindejoj. Veturante en plezurboato sur la lago, vi vidos tiujn tute naturajn belejojn. Kaj ĉiu vidindejo havas belan rakonton. Tial ĝuante la belaĵojn, vi povos koni la antikvan kulturon de Ĉinio.

La pagodo Liuhe de Hangzhou jam estis prenita kiel simbolo de la urbo Hangzhou. La pagodo konstruita en la 970-a jaro estas okangula. Oni diras, ke ĝia konstruado estis destinita por bremsi la superakvon de Qiantang-rivero, kiu trapasas la urbon.

Post vizitado de vidindejoj vi iros al te-ĝardeno. Hangzhou estas hejmloko de la tre fama teo "Longĝing". Multaj turistoj ŝatas ripozi en tetrinkejo ĝuante la delikatan teon. En la te-ĝardeno vi vidos, kiel oni kolektas kaj bakas tefoliojn.

En la sepa tago vi flugos de Hangzhou al Pekino. Pekino estas la kultura kaj politika centro de Ĉinio, kaj tie loĝas multaj ĉigong-istoj kaj ĉigong-ŝatantoj. En Pekino vi vidos prezentadon de famaj ĉigong-istoj kaj kunsidos kun ili. Cetere, vi certe devas pririgardi vidindejojn en Pekino. Ĉiumatene vi povos fari ĉigong-ekzercojn sub direktado de ĉigong-istoj.


Kredeble, vi pli malpli perceptos ĉigong-terapion dum la vojaĝo, kaj revenos hejmen kun refreŝigita energio.

En la pasinta jaro mi proponis al vi 12 itinerojn, kaj mi esperas, ke tiu aŭ ĉi tiu el ili plaĉos al vi. ■

ARTOJ DE ĈINIO

# Tradicio, esploro, evolucio

de **DING DONG**



S-ino Kang Shuzhen

LA delikatliniaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj de mezaĝa pentristino Kang Shuzhen (Kang Ŝuĝen) vekis pli kaj pli multan atenton ĉe pentristaroj kaj publiko. Multaj el ŝiaj verkoj estas konservataj de galerioj kaj muzeoj en- kaj eksterlandaj kaj ankaŭ kolektitaj en plurajn albumojn de modernaj famaj ĉinstilaj pentristoj.

Kial oni tiel alte taksas ŝiajn delikatliniajn pentraĵojn? La fama pentristo Pan Jiezi (Pan Ĝjiezi) trafe diris: "Kang Shuzhen pentras florojn kaj birdojn per peniko plena de sento, tamen ŝi ne estas memkontenta pri nura reaperigo de beleco de la naturo. Laŭ la vidpunkto de kreanto, ŝi esploras novan pentran lingvon, strebas al poeta etoso kaj viva temperamento, fandas la tradicion en modernan ideologion, montras novajn aspektojn kaj spiriton malsamajn al la malnova epoko kaj aliuloj."

"Fandi tradicion en modernan konscion", tio ja estas sukceso de la pentrado de Kang Shuzhen. La ĉinaj delikatliniaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj havas longan kaj valoran tradicion, tamen la formuloj estigitaj dum la pentrado fariĝis peza balasto. Tial, en Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911), kun la evoluo de erudiciula pentraĵo, la delikatlinia pentrado pri floroj kaj birdoj iom post iom dekadencis. En la pasintaj 10 jaroj, pro penado de nombro da pentristoj, tiu pentrarta speco tago post tago reviviĝis kaj prosperiĝis. Sed kiel plenigi tiun malnovan pentrarton per nova vivipovo, fariĝis komune interesata demando. Iuj pentristoj sin katenis per tradiciaj manieroj, tenis absolutan senŝanĝecon de la pentra lingvo. Al ili mankas ne lerteco, sed viveco kaj gusto. Aliaj pentristoj tute neis tradicion per "moderneco", provis per modernaj manieroj de Okcidento reformi ĉinan delikatlinian pentradon pri floroj kaj birdoj. Ilia pentra lingvo estas ekstreme abstrakta kaj nihilisma. Tia "renovigo" fakte ne elhakis novan vojon. Dume, nombro da mezaĝaj pentristoj heredas la tradicion de pentrado pri floroj kaj birdoj, sed ne konservative; ili asimilis kelkajn manierojn de olepentrado, akvarelo, liberstila pentrado kaj fotado, lernis de moderna pentrarto de Okcidento, tamen ne "ĝisfunde rompis" kun la tradicio. Ili evoluigis la pentrarton sur la bazo de tradicio, kreis nombron da eminentaj verkoj, kiuj interesas la artistaron kaj la socion. Ilia sukceso montras senliman vivipovon kaj brilan estontecon de delikatlinia pentrado pri floroj kaj birdoj. S-ino Kang Shuzhen estas unu el tiuj artistoj.

Ŝiaj delikatliniaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj ne nur montras profundan tradician lertecon, sed ankaŭ enhavas kortuŝan modernecon. S-ino Kang estis instruita de pluraj famaj pentristoj pri floroj kaj birdoj, kio metis por ŝi firman bazon. Delikatlinia pentrado akcentas konturadon per linioj kaj tuĉadon per inko kaj farbo. En ŝiaj pentraĵoj enmiksiĝis ŝiaj sentoj.

Pli valore estas, ke surbaze de la tradicio, s-ino Kang faris novan esploradon kaj evoluadon. Ŝi liberigis sin de kateno de tradicia desegnado de floroj kaj birdoj kaj tradicia farbado de banala ripeto. Ŝi emfazis kreon de arta atmosfero. Ŝi faris novan esploradon en strukturo, farbado kaj desegnado. En ŝiaj verkoj la strukturoj ne estas rutinaj, la kolorigado asimilis manierojn de Okcidento, kaj la desegnado asimilis la manierojn de oleopentrado kaj akvarelo. Dank' al tio ŝiaj verkoj evitis monotonecon kaj rigidecon, enkorpigis belecon de naturo kaj fortan tridimensian senteblecon. Sub ŝia peniko, ĉu la multe pentrataj peonio, krizantemo kaj lotuso, ĉu la neglektataj herboj, oleandro kaj aliaj ordinaraj floroj, ĉiuj kunigis la naturon kaj imagon, formis medion kun profunda etoso kaj poema gusto. Pro tio, ŝiaj verkoj ĉiam prezentas riĉan tempan kaj spacan liberecon, instigas la ĝuantojn imagi kaj infektiĝi, kaj entenas ŝiajn amon kaj strebon al la vivo. ■



Kukolo kaj floroj

# Indekso de EPĈ 1993


nr.pĝ.

## POLITIKO

Pri la 14-a Tutlanda Kongreso de KPĈ 1.12
Nova epoko de Ĉinio 7.4
Kontribuo de ordinara esperantistino Deng Tuanzi 8.12
Pri restarigo de la suvereneco de Ĉinio super Hongkong 9.4
Mao Zedong kaj la Yan'an-a Esperanta Ekspozicio 12.4

## EKONOMIO

Ekologia loĝejo en Yongkang 1.14
Bona natura haveno Lüsi 1.36
En la hejmloko de ruĝvertaj gruoj 1.44
Taihu-lago post la inundo 2.12
Salikoko-kulturado sur marbordo 2.26
Kariero de la Blua Stelo 3.6
La Zhoukou-a Fabriko de Mononatria Glutamato sur merkato 3.19
Botou-a piro famas en internacia merkato 3.42
Tridimensia agrikulturo en Miyi 4.6
La ceramika urbo Cizhou 5.37
En la tempo de vin-rikolto 5.41
Grena merkato en Ĉinio 6.6
Pekinanoj vivu en pura medio 6.8
La nuna stato de la ĉina fervojo 7.6
Tri paŝoj de la kampara reformado en Ĉinio 8.40
Granda olekampo en konstruado 10.16
La Bonespera Kabo en Sichuan 8.38
Malfacila ekflugo de la ĉina civila aviado 9.6
Altefika agrikulturo disvolviĝanta en Ĉinio 10.4
Ĉinio restas disvolviĝanta lando 11.4
Harbin, fenestro de norda Ĉinio 11.6

## REFORMADO

La administra mekanismo de ĉinaj entreprenoj en ŝanĝiĝo 1.6
Shougang sur la internacia merkato 3.8
Pri la sistemo de la socialisma merkata ekonomio de Ĉinio (1) 4.13
Pri la sistemo de la socialisma merkata ekonomio de Ĉinio (2) 5.8
Laŭpeca ter-ekspluato sur la ĉina ĉeftero 6.26
Iom pri altteknikaj ekspluataj distriktoj de Ĉinio 8.20
Pri reformado al la ĉina financa sistemo 9.8
Starigi novan scienc-teknikan sistemon 10.24
Iom pri makroreguligo de Ĉinio 12.38

nr.pĝ.

## VERDIGO EN ĈINIO

Verdigi Ĉinion 6.44
Granda verda muro en norda Ĉinio 7.33
Pekino verdiĝis 8.20
Verdigo en centra Ĉinio 9.20
Bambuoj verdigas Zhejiang 10.20
Verdaj marbordoj 11.28
Reprosperigo de la arbaroj en nordorienta Ĉinio 12.20

## KULTURO, EDUKO, SCIENCO KAJ TEKNIKO

Tie leviĝis satelitoj 2.6
Nova hejmo de granda pando 3.26
Inventinto de hibridigita rizo 4.22
Monhelpo al la eduka afero 5.18
Sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio al modernigo 6.30
Bona komenco de la kampara infana eduko 7.38
Ĉinaj ideogramoj kaj komputoro 7.40
Invento de ĉinaj studentoj 9.36
Ĉinaj studentoj en eksterlando 10.38
La Pekina Universitato en reformado 11.10
Pilgrimo, legendo, pentraĵo 11.14
Selenoriĉa regno 11.15
Ĉu konfuceanismo estas religio? 12.36

## HISTORIA MISTERO

Naŭ bronzaj ding-oj — simbolo de regpotenco 1.34
Pri la maŭzoleo de Qin-dinastio kaj argilaj militistoj kaj ĉevaloj 2.34
Kien migris antikvaj hunoj 3.12
Ĉu sur hirundo aŭ suŝuang-birdo? 4.37
Pri la historiaj objektoj en Dunhuang 5.38
Kie kuŝas la tomboj de imperiestroj de Yuan-dinastio? 6.40
Kiujn landojn vizitis la ĉina navigisto Zheng He? 7.8
Tri sensurskribaj steleoj 8.8
Kiam budhismo enkondukiĝis en Ĉinion? 9.10
Misteraj pendantaj ĉerkoj 10.8
Perdita nacio retrovita 11.8

## SPORTO KAJ HIGIENO

Luktado de handikapuloj 2.14
Nova tumor-lokalizilo 2.39
Ĉinio nuligas medikamentojn falsajn kaj malbonkvalitajn 4.12

Sporto de bravuloj 4.20
Vivovojo per bioritmo 5.12
Nova espero de la ĉina piedpilko 5.34
Forigi la malnovan moron por elimini epidemiojn 5.44
Neordinara boks-konkurso 7.48
Novaj fruktoj por homa sano 7.50
Solena sportkunveno de la orienta Azio 9.38
Frekvenc-spektra fizioterapia aparato 10.7
Furoras sanigaj ekzercoj 11.39
Monumento de la ĉina sporto 12.6
Ĉinio provas sciencan nutran dieton 12.10
Pri sanprotekto de maljunuloj en Ĉinio 12.40

## POR VIA SANO

Bonhumoriga gimnastiko kontraŭ hipertensio 3.34
Saniga ĉigong-terapio (I) 5.48
Saniga ĉigong-terapio (II) 7.15
Kuracado de astmo 9.41
Simplaj sanprotektaj metodoj 11.40

## PEKINO KAJ OLIMPIKOJ EN 2000

Espero kaj malfacilo estas kune 6.51
Diversstilaj konkursejoj 7.18
Telekomunikado rapide disvolviĝanta en Pekino 8.16

## AMUZOJ 1-12

## LITERATURO KAJ ARTO

Eŭropa opero en Ĉinio 1.38
Surplacaj artoj en Tianjin 2.20
En Bazaro de Malnovaj Popolaj Artaĵoj de Pekino 2.42
Du kronoj de la ĉina filmista rondo 3.30
Strebado de ĉina komponisto 4.40
Junaj televidaj filmoj de Ĉinio 5.30
Zhang Yimou, elstara talentulo de la ĉina filmista rondo 6.11
Qu Lingjun kaj lia papera drakoŝipo 6.34
Moderna ĉina dancarto 7.24
En la pentrista vilaĝo 8.6
Ĉinaj "Sistinaj Freskoj" 9.25
Muziko kaj danco por kulti Konfuceon 9.32
Vivo, filozofio kaj pekina gusto 10.42
Pri operoj de Ĉinio 11.32
Baleto en Ĉinio 12.28
Indiĝenoj kaj iliaj infanoj (Novelo) 2.37
Diamanto de s-ino Smeralda (Novelo) 8.41
Rajto de amo (Novelo) 10.36
Koliero el sorga tigo (Novelo) 12.44
Tri porinfanaj poemoj 3.16
Tri poemoj 5.14
Poemoj 10.12

## ARTOJ DE ĈINIO

Hao Liangbin kaj peonioj 2.27
Liu Wannian strebas por pentri veran Tibeton 4.27
Portretisto Dong Chensheng 6.27
Ŝtonaj gravuraĵoj en Deyang 8.25
Interesoplenaj pentraĵoj de s-ro Liu Bojun 10.25
Tradicio, esploro, evolucio 12.25

## METIARTAĴOJ

Novjara bildo reproduktita per karbo en Gaomi 1.27
Miniatura simio 3.27
Gluitaj ŝtofartaĵoj 5.27
Koloraj modlaĵoj de Fengxiang 7.31
Pastomodlisto Tang 9.50
Koloraj ovoj en Ĉinio 11.50

## SOCIA VIVO

En vilaĝo kun moroj kaj kulturoj de la ĉinaj nacioj 1.8
Rekonstrui la hejmlokon 1.21
Ĉina ĝardenistiko en la mondo 2.30
Nova servo al familioj 3.35
Sinoferema laboristino 3.38
Arbohakisto 3.40
Mia naskiĝloko Leting 4.34
La nova vivo de iuj ĉinaj kamparanoj 6.20
Narsa vivas feliĉan vivon 6.35
Intervjuo al oficisto pri narkotaj-malpermeso de Ĉinio 8.32
Vestobazaro Xiushuijie 8.36
La vivo de ĉinaj profesiulinoj 10.40
Furoras en Pekino favorataj bestoj 10.44
Miraklo de amo 11.37
Vidaĵoj en antaŭurbo de Ŝanhajo 11.46

## MOROJ DE ĈINAJ NACIOJ

Geedziĝa moro de tuĝja-oj 2.45
Kolektiva amuzaĵo en la 15-a de la unua monato 4.45
La Drakboata Festo 6.23
Marĉiino Mazu 8.29
Moroj ĉe la Silka Vojo 10.29
Montvilaĝo de keĝja-oj 12.30

## SUR STRATOJ

Malnova strato en malnova urbeto 1.31
Sur la antaŭa tervojo 3.23
Alilokanoj en Pekino 5.23
Al diverseco de laŭsezonaj vestoj 7.21
Motorciklo — modo de ĉina urbeto 9.29
La akvoriĉa urbo Shaoxing 11.25

## NACIOJ KAJ RELIGIOJ

Ĝojo de tibeta maljunulo 1.40
Katolikismo en Ĉinio 1.42
Sertar-Jinma-a Festivalo — grandioza kunveno sur altebenaĵo 5.9
Historia ŝanĝiĝo de la tibeta edukado 8.4
Iom pri la tibeta medicino 9.42
Historiaj ŝanĝoj en Tibeto 11.41
La festo Nadun de tuoj 12.39

## VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ

Pekino sur la vojo al la 27-aj Olimpiaj Ludoj 2.8
La Silka Vojo hodiaŭ 2.22
Gastu ĉe Hainan-insulo 3.45
Budhisma sanktejo Wutai-monto 4.8
Gajaj makakoj 4.42
Nova urbo sur la Leŭsa Altebenaĵo 5.6
Vizito al la Fantoma Urbo 9.28

## LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO

Sur la Riverfonta Vojo 1.51
Sur Bayanhar-montaro 2.51
La surstepa festivalo kaj la Templo de Princino Wencheng 3.51
Vojo al la ĉielo 4.51
Lhasa, la fino de la antikva vojo al Tibeto 5.51

## ITINERO PROPONITA

Septaga itinero A — Pekino-Xi'an-Ŝanhajo 1.30
Vojaĝo al la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero 2.41
Septaga itinero B — Ŝanhajo-Xi'an-Pekino 3.44
Vojaĝo en Tibeto 4.26
Septaga itinero C — Pekino-Xi'an-Guilin 5.26
Sur la stepo de Interna Mongolio 6.42
Septaga itinero Pekino-Xi'an-Ŝanhajo-Suzhou 7.37
Vojaĝo laŭ la Silka Vojo 8.15
Antikvaj ĉefurboj de Ĉinio 9.24
Budhisma sanktejo Emei-monto 10.28
12-taga itinero Pekino-Nankino-Huangshan-monto-Hangzhou 11.13
Itinero por ĉigong-o kaj korposanigo 12.24

## ALILANDANOJ EN ĈINIO

Vojaĝo al la 5-a Pacifika Kongreso en Ĉinio 7.14
Decembra semajno en Pekino 7.14
Ĉinio: lando de revoj 7.15

## ANTIKVAĴOJ KAJ ARKEOLOGIO

Ŝtonaj skulptaĵoj de maŭzoleoj de la Norda Song-dinastio 3.39
En la antikva urbo Qingzhou 4.31
En la granda antikva loĝejo de la familio Qiao 7.29
Manikeismaj temploj serĉataj 10.32
Naŭdrakaj ekranmuroj en Ĉinio 11.18

## INTERNACIAJ AFEROJ KAJ AMIKAJ KONTAKTOJ

Amikeco eterna tra generacioj 1.16
Verda revolucio leviĝanta 4.19
Por la scienc-teknika progreso de la disvolviĝantaj landoj 7.44
Akupunkturado al poloj 7.45
Verdaj arboj kresku ĉie sur la Tero 8.24
Kiel disvolviĝas agrikulturo de la mondo 9.47
Ponto de amikeco: Samarkand-Xi'an 10.14
Neforgesebla vizito en Rusio 12.12
Urĝa savo sur glaciejo 12.42
Profunda amo 12.46
Forigu rubon en la spaco 12.47

## ESPERANTO

Li estas puŝita en Esperantujon 1.18
Geesperantistoj intervizitadu 2.17
Vojaĝo en sep eŭropaj landoj 2.18
Kultivado sur la verdejo 3.14
Konatiĝo kun fraŭlino Sabira 4.14
Nin amikigis Esperanto 4.18
Valencio atendas kun malfermaj brakoj 6.14
Karmemore al Juan Régulo Pérez 6.15
Disfloru la spirito de Stafeto! 6.16
Verda tago memorinda 6.19
Kunikloj tre plaĉas ĉinojn 6.38
Strebo de esperantisto 7.10
Rava, denaska esperantistino 7.12
Komunikado en la Eŭropa Komunumo 8.10
Intervjuo al Sabira 9.12
Eksperimento en Slavjansko 9.14
Shi Chengtai kaj lia Esperanta literaturo 10.10
Kleriga kongreso en suna urbo 11.20
Por vigliĝo de la ĉina E-movado 12.14

## SUR NIA LIBROBRETO

Unu libro pri Japanio kaj la alia pri optimismo 1.20
Pri la ekstera politiko de Finnlando en la pasinteco 2.43
Du libroj el Japanio 4.30
Kiam venos la tago...? 8.46
Aventuroj de rikiŝisto 9.14
Moroj de ĉinaj nacimalplimultoj 9.15
Esperanto — iam danĝera lingvo 11.6

## POR KOMENCANTOJ

Lerni la ĉinan lingvon 1.17

| | nr.pĝ. |
|---|---|
| La edzino de la Luno | 2.19 |
| Karaj memoraĵoj | 3.22 |
| La Sorĉita floro | 4.39 |
| Malgranda epizodo | 5.22 |
| Bona loko por turistoj | 6.17 |
| Saĝa "trompisto" | 7.17 |
| Mia itala amikino Maddalena | 8.13 |
| Pri nia dekkvintaga restado en Gresillon | 9.16 |
| Malbelulino | 10.12 |
| Memriproĉo | 11.17 |
| Mi kaj miaj katetoj | 12.17 |


## ESP-NOVAĴOJ 1-12

## ALIAJ ASPEKTOJ

Novjaraj salutoj 1.6

## EL ĈINAJ GAZETOJ 1-12

## INTER NI 1-12

## KURANTAJ AFEROJ 1-12

## SUR LA KOVRILO

| | |
|---|---|
| Junaj jaŭ-oj en festaj vestoj | 1 |
| Kampara infano | 2 |
| Sceno el la danco "Knabino de Hui'an" | 3 |
| Li-a knabino | 4 |
| En la jaro de koko | 5 |
| Porceremoniaj knabinoj | 6 |
| Prof. Dai Liming | 7 |
| Mjaŭ-aj knabinoj | 8 |
| Muzikistino en antikva kostumo | 9 |
| Fiŝista knabino | 10 |
| Knabino antaŭ ruĝa pordo | 11 |
| Wang Junxia kaj aliaj sportistinoj en la Sepa Tutlanda Sportkunveno | 12 |


## INTERNE DE LA KOVRILO

| | |
|---|---|
| Antikva norio ĉe la bordo de la Flava Rivero | 1 |
| Neĝa arbaro | 2 |
| Tianzishan-monto | 3 |
| Ruino de eŭrop-stilaj konstruaĵoj en Yuanmingyuan-ĝardeno | 4 |
| En Pamiro | 5 |
| Pentrado en taja vilaĝo | 6 |


## FOTOJ

| | |
|---|---|
| Umefloroj | 1.4 |
| Sciuro | 2.4 |
| Akvolilio | 3.4 |
| Koloraj skulptaĵoj sur firsto | 4.4 |
| Ronda luno | 5.4 |
| Birdo | 6.4 |
| Koloraj fontanoj | 7.2 |
| Orkideo | 8.2 |
| Pino simila al kuŝanta drako | 9.2 |
| Belaj tegmentrandoj | 10.2 |
| Kaverno sur maro | 11.2 |
| Velkintaj lotusfloroj | 12.2 |


## ĈINAJ POŜTMARKOJ

| | |
|---|---|
| Popolaj ludiloj | 2.56 |
| Ĝardenoj de Suzhou | 5.56 |
| La Okcidenta Lago de Hangzhou | 8.51 |


## FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

| | |
|---|---|
| Infano de Samo-familio en norda Norvegio | 3.56 |
| Reĝo kaj reĝino rigardantaj sian landon | 3.56 |
| La haveno de Oslo | 4.56 |
| En fagarbaro en printempo | 4.56 |
| Sur la rivereto Rio en Giulio | 10.51 |
| Sunsubiro ĉe malsupra Lago de Mantova | 10.51 |
| Ortodoksa preĝejo en Karlovy Vary, Ĉeĥio | 12.51 |
| Strateto en vilaĝo de norda Nederlando | 12.51 |


## BILDOSERIOJ

| | |
|---|---|
| Tianjin vidata de sur la televizia turo | 2.32 |
| Brikskulptaĵoj en Ĉinio | 2.36 |
| Pontoj de Lanzhou | 3.9 |
| En stratetoj de Chengdu | 4.24 |
| Tropikaj floroj | 4.36 |
| En koka jaro | 5.20 |
| Nigra fajenco | 5.36 |
| Ŝaffela floso sur la Flava Rivero | 5.46 |
| En infan-ĝardeno | 6.32 |
| Kuriozaj konstruaĵoj en Ningxia | 6.36 |
| Dancoj de naciminoritatoj | 7.26 |
| Alilandaj studentoj en Ĉinio | 7.42 |
| Surglacia konkurso | 7.48 |
| E. Kidd transsaltis la Grandan Muron | 8.34 |
| "Xinjiang-vilaĝo" en Pekino | 8.44 |
| Akvoellasa ceremonio ĉe Dujiangyan | 9.18 |
| Internacia geedziĝo | 9.34 |
| Orkestroj en elementaj lernejoj | 9.44 |
| Changdao | 10.18 |
| Qianjiang | 10.34 |
| Junaj amantoj de rokmuziko | 10.46 |
| La Antikva Scenejo en Tianjin | 11.34 |
| Kvadrata korto en Pekino | 11.43 |
| Unuaklasaj lernantoj de elementa lernejo | 12.18 |
| Bestaj specimenoj | 12.34 |


## SUR LA DORSKOVRILO

| | |
|---|---|
| La pitoreskejo Longqingxia en Pekino | 7 |
| Pejzaĝo de Tianshan-monto | 8 |
| Sur monta vojeto | 9 |
| Ĉe fonto en arbaro | 10 |
| La akvofalo Hukou sur la Flava Rivero | 11 |
| Huangshan-monto en aŭtuno | 12 |



Birdoj sur umearbo

Umefloroj



ZHAO JUN:

# Baleto en Ĉinio



Sceno el la baleto "Blankhara Knabino"

BALETO naskiĝinta en Italio antaŭ kelkcent jaroj, enkondukiĝis poste en Francion, Britio, Danlandon kaj Rusion, kun diversaj skoloj. Hodiaŭ en Ĉinio multaj artistoj laboras super ĝi. Ĝi estas bonvena en la urboj kaj la junuloj rigardas ĝin eleganta arto.

## PLEJ FRUAJ ĈINAJ BALETSTELULINOJ

Yu Rongling (Ju Ĵongling), honordamo de la imperiestra patrino Cixi (Ciŝji) de Qing-dinastio (1644-1911 p.K.), estas la unua baletstelulino de Ĉinio. Ŝi devenis de nobela familio kaj iam loĝis en Parizo kun sia patro, sendito de Ĉinio al Francio. En 1900 18-jara, ŝi eklernis modernan dancon ĉe fama usona dancistino Isadora Duncan en Parizo. Poste, ŝi lernis baleton en la Ŝtata Muzika kaj Danca Instituto de Parizo. Ŝi rolis kiel papilio-feino en la baleto "Rozo kaj Papilio" prezentata en la Ŝtata Teatro de Francio. Ŝi ankaŭ bone dancis hispanan kaj grekan dancojn, kio sensaciis Parizon. Reveninte al Ĉinio, ŝi dancis nur por distri Cixi kaj neniam montris sian talenton antaŭ publiko.

Je la komenco de la 20-a jc vigliĝis la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Okcidento, kaj alilandaj dancartaj instruistoj venis al Ĉinio. Inter ili plej famis la rusaj rifuĝintaj geedzoj Ŝakovskij, kiuj funkciigis ensemblon kaj lernejon por ĉinaj lernantoj en Ŝanhajo.

El la ĉinaj lernantoj de la geedzoj f-ino Hu Rongrong (Hu Ĵongĵong) estis la plej elstara. De la aĝo de kvin jaroj ŝi lernis baleton ĉe la geedzoj. La lernado daŭris 15 jarojn. Ŝi memoras bone, ke tiam en ĉiu sezono Ŝanhajo havis baletan prezentadon, kiun partoprenis dancistoj de malsamaj naciecoj. En ĝi ŝi ofte ludis ĉefan rolon kaj pro tio rapide famiĝis. La spektantoj plejparte estis eŭropanoj kaj ĉinaj mondumanoj.

La ĉina f-ino Dai Ailian, kiu loĝis en Britio, estis lernantino de Anton Dolin, mondfama majstro de la arto. Poste, ŝin instruis ankaŭ majstro Marie Rambet. En 1939 ŝi sukcese trapasis la ekzamenon por eniri faman dancan lernejon. Sed la sekvantan jaron la Dua Mondmilito ĉesigis ŝian lernadon. Ŝi revenis al Ĉinio kaj instruis baleton. Ŝi kaj Hu Rongrong ambaŭ estis pioniroj de la baleta afero de la nova Ĉinio kaj funkciis respektive kiel estro de la Centra Baleta Ensemblo en Pekino kaj tiu de la Baleta Ensemblo en Ŝanhajo.

## PREZENTADO DE "CIGNA LAGO" EN PEKINO

En 1950, post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, invitite, la geedzoj Ŝakovskij instruis baleton en la Centra Teatra Instituto de Pekino. Inter 1954 kaj 1956, la merita aktoro P.A.Guŝev kaj aliaj de Sovetunio, invitite de la ĉina registaro, venis al Ĉinio por kulturi koregrafojn, baletistojn kaj instruistojn. Ili helpis starigi la unuan dancan lernejon de Ĉinio. Jen komenciĝis la baleta afero de la nova Ĉinio.

Julio de 1958 estis memorinda en la baleta historio de Ĉinio. Helpe de la sovetiaj artistoj, la Pekina Danca Lernejo unuafoje prezentis la baleton "Cigna Lago", kion P.A. Guŝev laŭdis kiel kuraĝan provon, ĉar antaŭe neniu danca lernejo prezentis la tutan baleton.

18-jara studentino Bai Shuxiang (Baj Ŝuŝjang) estis la unua dancistino en Ĉinio, kiu sukcese ludis la rolon de la "cigno". Ŝi kaj tiama koregrafo Li Chengxiang (Li Ĉengŝjang) nun estras la Centran Baletan Ensemblon.

En 1959 la unuaj diplomitoj de la lernejo fondis prov-ensemblon de baleto, kiu poste nomiĝis la Centra Baleta Ensemblo. Ili prezentis klasikajn baletojn, kiaj "La Korsaro", "Giselle", "La Senutila Singardo",



Sceno el la baleto "Cigna Lago"

"La Fonto de Baĥĉesaraj" kaj "La Esmeralda".

## "RUĜA VIRINA TAĈMENTO" KAJ "BLANKHARA KNABINO"

Je la komenco de la 50-aj jaroj, baleto unuafoje aperis antaŭ la ĉina publiko en formo de strata teatraĵo kun la nomo "Porpaca Kolombo" verkita de fama dramisto Ouyang Yuqian (Oŭjang Juĉjan) por prikanti la mondpacon. Katenate de tradiciaj estetikaj konceptoj, tiam plejparto de la ĉinoj ne povis akcepti tiun arton. Sed poste fariĝis tute alie kaj ĉinaj artistoj kreis siajn proprajn baletojn.

En 1964 la Centra Baleta Ensemblo prezentis la baleton "Ruĝa Virina Taĉmento" kreitan de Li Chengxiang, Jiang Zuhui (Ĝjang Zuhuj) kaj Wang Xixian (Ŭang Ŝjiŝjan) surbaze de vera okazintaĵo: Gvidate de la Komunista Partio de Ĉinio, sklavino Wu Qionghua (U Ĉjonghŭa) kaj aliaj malriĉaj virinoj sur Hainan-insulo de Ĉinio liberiĝis el sub la feŭdisma subpremado kaj soldatiĝis por gajni la nacian liberiĝon.

Du jarojn poste, la Ŝanhaja Danca Lernejo surscenigis la modernan baleton "Blankhara Knabino" pri la vera okazintaĵo en norda Ĉinio. Xi'er (Ŝji'er), filino de terluanto, sin kaŝis en montaro multjare por eskapi la neelteneblan turmenton far tirana bienulo. Post la Liberiĝo ŝi komencis sian novan vivon. La baleton verkis Hu Rongrong, Lin Yangyang, Fu Aidi kaj Cheng Daihui. Dank'al asimilo de la suko de ĉinaj muziko, popola kaj klasika dancoj, riĉiĝis la dancesprimo de la baletoj, kiuj konformas al la leĝo de baleto kaj ankaŭ havas ĉinajn karakterojn. La sukceso skuis la ĉinan dancistan rondon. Poste, oni filmis la baletojn, kio ĝuigis centojn da milionoj da kamparanoj pri la arto. Nun ili estas ankoraŭ rigardataj kiel modeloj por la ĉinaj baletoj. En la Centro de Artaj Materialoj en Vaŝingtono konserviĝas la tuta kopio de "Ruĝa Virina Taĉmento" kiel fama baleto de la mondo.

Fine de la 70-aj jaroj, fondiĝis la Ŝanhaja kaj la Shenyang (Ŝenjang)-a Baletaj Ensembloj. Multiĝis baletoj kreitaj surbaze de famaj ĉinaj klasikaj kaj modernaj literaturaj verkoj, kiaj "Benopeta Ofero", "Liang Shanbo kaj Zhu Yingtai (Ĝu Jingtaj)" kaj "Lin Daiyu". Ili priskibas ĉefe la mizeran sorton de virinoj en la feŭda socio.

## INTERŜANĜO KAJ DISVOLVIĜO

Nelonge post 1954, komenciĝis la arta interŝanĝo inter ĉinaj kaj alilandaj baletistoj. La Macuyama-a Baleta Ensemplo de Japanio vizitis Ĉinion. En 1978 Ĉinio komencis interŝanĝi baletajn instruistojn kun aliaj landoj. La baletaj ensembloj de Japanio, Britio, Usono kaj Danlando vizitis Ĉinion unu post alia. La usona majstro Anton Dolin, fondinto Franck de la Kanada Baleta Ensemblo, arta direktanto Aaron de la Reĝa Danca Lernejo de Britio kaj la unua baletstelulino Lisette de la Pariza Opera Teatro venis al Ĉinio por fari direktadon. En 1980, usona koregrafo Stevenson vizitis la Pekinan Dancan Instituton. Poste, ĉiujare li instruis en ĝi kelkan tempon.

Depost 1980 junaj ĉinaj baletistoj partoprenis gravajn internaciajn konkursojn en Osako, Moskvo, Laŭzano kaj gajnis premiojn en ili.

La monda baleta rondo ekatentis Ĉinion. La junaj gebaletistoj Guo Peihui kaj Zhao Minhua (Ĝaŭ Minhŭa) invitite ludis ĉefajn rolojn sur la scenejo de la Pariza Opera Teatro.

Krome, Hu Rongrong kaj Dai Ailian estis invititaj funkcii kiel juĝantoj de internaciaj baletaj konkursoj. Profitante la okazon, ili prezentis la ĉinan baleton al alilandanoj.

La ĉinaj baletistoj ne kontentas pri siaj sukcesoj, sed anstataŭe, ili penas por atingi la plej altan nivelon de baleto en la mondo. ■

MOROJ DE ĈINAJ NACIOJ

# Montvilaĝo de keĝja-oj

Teksto de **QIU HUANXING**

Fotoj de **LU ZHONGMIN**



Enteriga ceremonio

Kvadrata kastelo





Kulto de la prapatroj en la familia templo

LA keĝja-oj, branĉo de han-nacio de Ĉinio, estas atentataj pro siaj apartaj historio, vivmaniero, loĝdomoj kaj moroj.

## LA ĈIRKAŬITA DOMO DE KEĜJA-OJ

La loĝdomoj de keĝja-oj estas rondforma aŭ kvadrata kastelo el adoboj. El ili la plej bonaj estas la duonrondaj kaj palacformaj.

Mi devenis de keĝja-a familio, plurgeneracie loĝinta en oblonga, palacforma ĉirkaŭita domo. Post la pordego, sinsekve estas vestiblo, kvadrata korteto kaj ĉefa salono. Ambaŭflanke de ĝi estas koridoro, kondukanta al strioforma korto kaj domo dekstre kaj maldekstre. Tiamaniere la pli ol 40 ĉambroj ligiĝas unu kun alia.

Sur monteto malantaŭ mia loĝejo kreskas pinoj, cipresoj kaj oranĝarboj. Antaŭ mia domo troviĝas sekigejo kaj duonronda cisterno, kien fluas la ellasita akvo de la tri kortoj kaj kie naĝas fiŝoj. De tie oni ankaŭ ĉerpas akvon por

akvumi legomĝardenon kaj estingi incendion.

La keĝja-oj ĝenerale konstruas siajn domojn sur kampoj aŭ mildaj montdeklivoj. Unue oni konstruas la familian templon kaj loĝdomon. Kun multiĝo de la familianoj, oni devas konstrui novajn domojn, ambaŭflanke de la malnova, malantaŭ la templo. Tiamaniere aperas duonronda ĉirkaŭita domo en unu, du aŭ tri tavoloj.

En la festotagoj, la tuta familio kultas siajn praulojn en la familia templo. En la nupto oni tie adorkliniĝas al la prapatroj kaj faras bankedon por la gastoj. La novedziniĝonta familianino devas adiaŭi siajn prapatrojn kaj post tio iras al la edza hejmo. La familia templo funkcias ankaŭ kiel funebrejo por la mortintoj.

## APARTAJ MOROJ KAŬZITAJ DE TUMULTA VIVO

La keĝja-oj antaŭe vivis en la meza baseno de la Flava Rivero. En la 3-a jarcento, pro milita tumulto kaj naturaj katastrofoj, ili transloĝiĝis suden al pli kvieta, paca loko de suda Ĉinio, kaj tiamaniere formiĝis la plej fruaj keĝja-oj, loĝantaj en la provincoj Guangdong, Fujian (Fuĝjan), Hunan, Jiangxi (Ĝjangŝji), Hainan kaj Taiwan kaj la Guangxi (Gŭangŝji)-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. Ili vivas ĉefe en montregionoj de tiuj provincoj.

Por memori sian hejmlokon, la transloĝiĝintaj keĝja-oj komplete konservis siajn morojn, kulturajn trajtojn kaj dialekton.

Inter la keĝja-oj cirkulas la moro manĝi toŭfu-on farĉitan per viando en la Printempa Festo, samkiel iliaj prauloj manĝis ĝjaŭzi-on. Ĉar en suda Ĉinio mankis faruno kaj ne eblis fari ĝaŭzi-on, la keĝja-oj do anstataŭe ekmanĝis toŭfu-on kun vianda farĉo.

La funebra moro de keĝja-oj estas tre distingiĝa: Unue oni enĉerkigas la mortinton kaj enterigas



Parto de ronda kastelo

la ĉerkon. Post tri, kvin aŭ pli multaj jaroj, oni elterigas la ĉerkon, metas la ostojn de la mortinto en ceramikan vazegon kaj enterigas ĝin en bonaŭgura tago. Ĉar antaŭe, la keĝja-oj ofte transloĝiĝis, ili timis, ke ili ne povos reveni al la antaŭa loĝloko por prizorgi la praulan tombon, do en la transloĝado la viroj portis kun si ostarojn de siaj mortintaj prauloj kaj enterigis ilin en la nova fiksa loĝloko. De tio formiĝis la moro supre dirita.

Suferinte de ofta transloĝiĝo, la keĝja-oj avidis kvietan kaj stabilan vivon. Iliaj multaj moroj montras tian deziron: Ekz., la novedziniĝonta knabino portas fasketon da sovaĝaj herboj al la hejmo de sia edzo kaj metas ĝin sur sian liton. Post la geedziĝa ceremonio ŝi plantas la herbojn en la legomĝardeno de sia edzo, kio signifas ke ŝi enradikiĝas tie, samkiel la herboj en la kampo.

## REGULOJ DE KEĜJA-A VILAĜO

Patriarkismo profunde influas keĝja-ojn. Ili elektas saĝan, bravan kaj justan kompetentulon la patriarko-vilaĝestro. La patriarko-vilaĝestro rajtas fari ĉion por protekti la klanajn interesojn. Kvankam li faras terkulturadon ĉiutage, tamen kiam en la vilaĝo okazas kulto, geedziĝo, funebra afero, konstruado de lernejo, irigacia instalaĵo, ponto kaj vojo, li do kunvenigas la vilaĝanojn por diskuti, kiel efektivigi la aferon. Li rajtas ankaŭ puni la fiulojn inter la vilaĝanoj, kaj decidi kiel solvi la konfliktojn kun aliaj vilaĝoj.

Por la kvieta vivo, la keĝja-oj observas regulojn: Ĉiu familio egalrajte uzas akvon por rizidpriklado. La patriarko-vilaĝestro malpermesas haltigi la akvofluon por sia uzo. Se iu vundis alian pro la akvo, la batinto devas pagi monsumon al la vundito je kuracado kaj bruligi petardon antaŭ la loĝejo de la vundito por peti pardonon. Aŭtune, kiam maturiĝas rizo, la patriarko-vilaĝestro avertas la vilaĝanojn, ke ili ne lasu siajn kokojn kaj anasojn al la kampoj damaĝi la grenon. Publika forsto estas grava ekonomia fonto. Kiu ŝtele hakas arbon, tiu devas doni kompenson. Se oni pro malatento kaŭzas incendion, krom pagi monpunon, tiu devas fari festenon por la vilaĝanoj, kiuj partoprenas la estingadon.

Nun, la ŝtataj leĝoj jam anstataŭis tiujn vilaĝajn regulojn, tamen la tradiciaj reguloj daŭre efikas por protekti la unuecon kaj kvietecon en la vilaĝo. ■

# Testo de inteligenteco


*Ĉi-sube estas tri demandoj por testo de inteligenteco senditaj de nia nederlanda leganto s-ro Marcel van Dooren. Niaj legantoj bonvolu testi sian inteligentecon per ili. La respondoj troveblas en ĉi numero.*

**La Red.**

### I. ELPRENO DE GANTOJ

En malluma ĉambro mikse metiĝas kvin paroj da nigraj gantoj, tri paroj da ruĝaj kaj du paroj da blankaj. Almenaŭ kiom da gantoj oni devas elpreni, por ke du el ili estu samkoloraj?


### II. ŜOVELILO KAJ PASTEĈO



Pasteĉo estas sur ŝovelilo formita el kvar alumetoj. Movu nur du el ili kaj ne rompu ilin. Kiu povas movi la pasteĉon eksteren de la ŝovelilo kiel eble plej rapide?

### III. GRANDIGO DE LAGETO

Kampulo havas parcelon da tero kun kvadrata lageto en la mezo. En ĉiu angulo de la lageto kreskas unu arbo. Li planas duobligi la lageton, kondiĉe ke ĝi ankoraŭ havos kvadratan formon kaj la arboj ankoraŭ kreskos. Kion fari? Helpu lin!



# VORTENIGMO

*Nia brazila leganto s-ro Jose Saraiva Matos sendis vortenigmon al nia rubriko. Plenigu la kvadratetojn per literoj por formi el ili silabon aŭ vorton. Enmetu samajn literojn en ĉiun kvadrateton kun sama cifero. La silaboj en kvadratetoj nigre kadritaj konsistigos la titolon de plej grava Esperanta gazeto de la mondo. Interesitoj sendu la solvon al:*

Caixa Postal, 676-40015-140
SALVADOR-BAHIA
BRAZILO

*S-ro Jose Saraiva Matos premios ĉiun sukcesinton per poŝtkarto pri la plej antikva urbo Salvador en Brazilo, kiu estis konstruita la 29-an de marto 1549.*

**La Red.**

## Bildo por vortenigmo

1. Tiu, kiu en unu ŝtato ĝuas suverenecon.

   18 19 · 20 1 · 4 1 · 14 8

2. Interkonsento, laŭ kiu du aŭ pluraj personoj renkontiĝas en la sama loko, je la sama horo.

   4 1 14 · 12 1 · 20 19 · 8

3. Granda muzika verko por orkestro.

   18 6 3 · 15 8 · 14 6 · 8

4. Forlasi naskiĝejon por transloĝiĝi en fremdan landon.

   1 5 · 3 6 · 2 4 6

5. La plej fama el la antikvaj medicinistoj.

   7 6 · 10 8 · 9 4 13 · 11 8

6. Monstro, duone ĉevalo, duone fiŝo.

   7 6 · 10 8 · 9 13 3 · 10 8

7. Bongusta solida pasto, farita el kakao, sukero kaj aromaĵoj.

   16 8 · 9 8 · 5 13 · 12 8

8. Loĝanto de Koĉinĉinujo.


   9 8 · 16 6 14 · 16 6 · 14 8

9. Kunmeto de sonoj, silaboj aŭ vortoj, kies senharmonio vundas la orelon.

   9 13 · 9 8 · 15 8 · 14 6 · 8

10. Sud-amerika lando.

    9 8 · 5 8 3 · 17 6 · 8



Leopardo

# Bestaj specimenoj

Fari specimenojn de mortintaj bestoj estas arto kompleksa kaj delikata. S-ro Xiao Fang (Ŝjaŭ Fang) de la Pekina Zoologia Ĝardeno estas lerta en tio. En la daŭro de dekkelkaj jaroj li okupiĝis pri tiu laboro kaj faris pli ol 500 specimenojn de birdoj, rabobestoj kaj raraj bestoj de la mondo. Tiuj specimenoj servas ankaŭ kiel lerniloj por popularigi sciojn pri bestoj.

Fotoj de **LIU SIGONG**

Birdo




Pando






S-ro Xiao Fang faras specimenon.



Testudo



Cervo



Vulturo

HE YUN:

# Ĉu konfuceanismo estas religio?

EN Ĉinio budhismo, taoismo, islamismo, katolikismo kaj protestantismo estas konataj. Taoismo naskiĝis en Ĉinio, dum la aliaj enkondukiĝis el aliaj landoj.

Ili estas klare difinitaj kiel religioj jam ĉe sia naskiĝo. Tamen, en la ĉina historio estis konfuceanismo, kiu pli frue naskiĝis kaj pli profunde influis la ĉinojn.

Kiel supre diritaj religioj, ankaŭ konfuceanismo havas siajn fondinton, doktrinon, riton kaj organizaĵon. Ĉu en la Ĉiela Altaro kaj Imperiestra Palaco de Pekino, ĉu en la Templo de Konfuceo en Qufu (Ĉjufu) de Shandong, alilandaj turistoj povas percepti la ekziston kaj influon de konfuceanismo. Ili pretervole demandas, ĉu konfuceanismo estas ĉinstila religio.

Plejparto de la ĉinoj opinias, ke konfuceanismo ne estas religio. Ĝi estas morala doktrino de la prapatroj, kun aŭtoritateco kaj intimeco. Laŭ la morala doktrino oni mem kulturas sin, unuigas siajn familianojn, ordigas sian landon kaj pacigas la socion.

Ni retrospektive rigardu la originon kaj disvolviĝon de konfuceanismo en Ĉinio.

Konfuceo (551-479 a.K.) estis la fondinto de konfuceanismo. Li estis diligenta. Li iam funkciis kiel oficisto, sed li okupiĝis ĉefe pri edukado dum la tuta vivo. Li estis la unua fari privatan edukadon en la ĉina historio. Li havis 3 000 lernantojn, inter kiuj pli ol 70 fariĝis eminentuloj, ekz. Yanhui, Zigong kaj Zilu. Li alte taksis la tradician kulturon de Ĉinio. Komence li edukis siajn lernantojn per ses specoj da teknikoj kaj artoj, kiuj riĉis je moraleco. Poste, li edukis ilin per siaj kompilitaj klasikaĵoj "Libro de Poezio", "Libro de Historio", "Libro de Ritoj", "Libro de Ŝanĝiĝoj" kaj "Printempo kaj Aŭtuno". En la postaj 2 000 jaroj tiuj verkoj estis fundamentaj klasikaĵoj de konfuceanismo, kaj la libro "Analekto de Konfuceo", kompilita de liaj disĉiploj surbaze de liaj vortoj kaj konduto, estis tipa verko, kiu muldis la animon de la ĉinaj intelektuloj. Serio da etikaj pensoj de Konfuceo estis fundamentaj moraloj kaj agprincipoj de ĉinoj. Ili estas jene: La subuloj devas esti fidelaj al siaj superuloj; la gefiloj devas respektoplene obei siajn gepatrojn; la gefratoj devas ami unu alian; kaj la amikoj devas fidi unu alian.

Post Konfuceo, Mengzi (ĉ. 372-289 a.K.), kaj Xunzi (ĉ. 313-238 a.K.), majstroj de konfuceanismo en la Periodo de Militantaj Regnoj, prenis la propagandon de la doktrino de Konfuceo kiel sian ĉefan taskon. Tiuflanke sufiĉe granda estis la kontribuo de Mengzi, tial oni nomas konfuceanismon la doktrino de Konfuceo kaj Mengzi.

Fakte, en la 4-5 jarcentoj antaŭ Qin-dinastio (221-206 a.K.) naskiĝis ne nur konfuceanismo, sed ankaŭ aliaj doktrinoj, kiaj taoismo kaj legitimismo, kaj aperis konkuro inter multaj skoloj en egala pozicio.

En Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) konfuceanismo havis monopolon super aliaj skoloj. Imperiestro Wudi (156-87 a.K. sur trono) de Han-dinastio estis unu el la suverenoj plej kultataj de ĉinoj. En politiko, ekonomio kaj militaj aferoj li solidigis la feŭdan centralizitan reĝimon senprecedence. Responde al tio, la tiama plej fama pensulo Dong Zhongshu (197-104 a.K.) helpis lin en la unuecigo de kulturo kaj ideologio. En 134 a.K. imperiestro Wudi persone venigis famajn intelektulojn por konsulti ilin pri ŝtataj aferoj. Dong Zhongshu proponis, ke ĉiuj pensoj nekonformaj al la doktrino de Konfuceo devas esti forigitaj kaj malpermesitaj. Imperiestro Wudi akceptis lian proponon kaj ordonis nuligi la aliajn skolojn kaj kulti konfuceanismon ekskluzive. De



Konfuceo en instruado

tiam konfuceanismo regis en la kulturo kaj ideologio de la ĉina socio.

Kompreneble, la absoluta pozicio de konfuceanismo spertis multajn provojn. Nelonge post ĝi, taoismo naskiĝis kaj budhismo enkondukiĝis en Ĉinion. La regantoj kaj la popolanoj de Ĉinio proksimiĝis al aŭ ekkredis je la veraj religioj. En la postaj kelkaj jarcentoj konfuceanismo alfrontis la defion de la religioj, tiel aperis la situacio, en kiu ekzistis samtempe konfuceanismo, budhismo kaj taoismo. Kompreneble, konfuceanismo neniam perdis sian pozicion, intertempe ĝi ankaŭ enprenis en sin multajn religiajn doktrinojn.

En Tang-dinastio (618-907) la intelektuloj, kiuj pretendis esti reprezentantoj de la tradicia ĉina kulturo, denove defiis budhismon kaj taoismon. Han Yu (768-824) estis ilia reprezentanto. Kiel gvidanto de la ideologia rondo, li taskis al si reprosperigon de konfuceanismo kaj klasika literaturo. Li aktive propagandis, ke la ĉina kulturo prenas konfuceanismon kiel sian ortodoksecon, kaj ekskludis budhismon, kio aŭspiciis la ampleksan reprosperigon de konfuceanismo.

La alia ampleksa reprosperigo de konfuceanismo okazis en Song-dinastio (906-1279) kaj daŭris ĝis Ming-dinastio (1368-1644). En la ĉina historio oni nomis la fenomenon la etiko de Song kaj Ming. Fakte, en tiu ĉi periodo konfuceanismo paŝon post paŝo fariĝis kvazaŭreligio. La ĉefa marko de la ŝanĝiĝo esence estis, ke la doktrino de Konfuceo kaj Mengzi, aŭtoritata kaj plena de moralaj kriterioj de la prapatroj, paŝon post paŝo fariĝis serio da timigaj reguloj kaj leĝoj. De la interna animo ĝis la eksteraj vivkondiĉoj ĝi determinis sendubajn kaj nerefuteblajn leĝojn por la homoj. Kiuj malobservas ilin, estos punitaj de la socio aŭ riproĉos sin mem pro kulpoj. Tial, konfuceanismo estas severe kritikitaj de nuntempaj ĉinoj. Ekzemple, konfuceano Cheng Yi de Song-dinastio avertis la virinojn, precipe la vidvinojn: "Ne gravas la morto pro malsato, sed gravas senĉasteco." Li, lia pliaĝa frato Cheng Hao kaj Zhu Xi (Ĝu Ŝji) fariĝis ĉefaj reprezentantoj de la etiko de Song kaj Ming. Ili tri estis gravaj kreintoj de la brila ĉina kulturo.

En la nuna Ĉinio, kvankam konfuceanismo kiel religio ne plu estas en la tuto, tamen kiel kultura fenomeno ĝi estos neniam ignorebla. ■

# Iom pri makroreguligo de Ĉinio

de **DA WEI**

1993 estas jaro, en kiu la reformado, pordmalfermo kaj moderniga konstruado de Ĉinio daŭre disvolviĝas. En tiu jaro, ĝenerale dirite, la ekonomia situacio estas bona, kaj aperis ankaŭ iuj problemoj, kiuj estas urĝe solvendaj, kia malordo de la financaj aferoj. Por solvi tiujn problemojn la registaro alprenis serion da metodoj por fortigi makroreguligon.

Ni jam akiris sukceson en mallonga tempo. La valoro de la ĉina mono *Jenminbi* fariĝis kompare stabila. La deponita monsumo de la ĉinaj loĝantoj ree grandiĝis. En borsoj la interŝanĝa procento de fremdaj valutoj kaj *Jenminbi* fariĝis kompare racia. Falis la trorapida kresko de investo por domoj kaj terpecoj kaj konstruado de ekspluatataj regionoj. De tio oni povas vidi, ke Ĉinio nepre devas fari ekonomian makroreguligon en sia praktiko de la merkata ekonomio.

Fama ekonomikisto s-ro Dai Yuanchen diris, ke Ĉinio devas konstrui kaj disvolvi merkatan ekonomion ne liberan, nek anarkiisman. Ĝi bezonas la merkatan ekonomion, en kiu la socialisma ŝtato plene ludas sian rolon en makroreguligo kaj administrado. La merkato, kiel bazo por dispozicii la riĉfontojn, utilas al ĝustatempa reguligo de la produktado kaj bezonado, al teknika progreso kaj efikeco de la investaĵoj, tamen ĝi ne estas ĉiopova. Ĝi portas iagrade spontaneecon kaj blindecon. Reguligo sole de merkato ne povas teni la ekonomion en ĝenerala ekvilibro nek la ekonomian strukturon en konstanta harmonio, kaj plie ĝi ne povas garantii la konstantan kaj stabilan disvolviĝon de la ekonomio kaj preventi la pligrandiĝon de la distribua diferenco. Nun en Ĉinio la merkata sistemo estas ankoraŭ neperfekta, mankas al ĝi kompleta merkata regularo, kaj ekzistas nemalmultaj malfaciloj en komunikiĝo kaj kolektado de la merkataj informoj. Sub tiaj cirkonstancoj oni devas dediĉi pli grandan atenton al la makroreguligo far la registaro.

Nun Ĉinio faras makroreguligon ĉefe per jenaj manieroj:

Stabiligi la financajn aferojn, rigore kontroli bileto-emision kaj krediton, reguligi la financajn ordojn kaj kategorie malpermesi kontraŭleĝan monkolektadon.

La Ĉina Popola Banko, la Ministerio de la Financaj Aferoj kaj Imposta Buroo faris firmajn paŝojn por solvi la problemojn de la financaj kaj impostaj rondoj, ekz. senprokraste ĉesigi ĉian ajn kontraŭleĝan monprunton, kvitigi kaj repreni ĉiujn kontraŭleĝajn pruntojn en la difinita tempo, doni al neniu financa establaĵo la rajton levi la rentumon de deponado kaj kredito; tuj ĉesigi monhelpon far la bankoj al iliaj propraj ekonomiaj entreprenoj kaj alpreni fortajn rimedojn por garantii per mono la gravajn konstruajn projektojn.

Rapidigi la reformajn paŝojn en la financaj aferoj, investa kaj imposta sistemoj, pluapaŝe perfektigi emision de obligacioj kaj reguligi la merkatan administradon, plibonigi la administradon de la fremdaj valutoj kaj stabiligi la fremdvalutan kurzon.

Denove ekzameni la konstruajn projektojn kaj severe limigi la konstruadon de novaj projektoj.

Aktive kaj sekure konduki la reformadon en la prezaro kaj bridi la trorapidan prezleviĝon en la tuto. La registaro prenis konvenajn metodojn por reguligi la financajn ordojn, kiel plialtigi la interezon de la deponado kaj kredito, streĉi la krediton, premi ŝakradon per domoj kaj akcioj, varbi deponaĵon kaj teni la interŝanĝan procenton inter la ĉina mono *Jenminbi* kaj fremdaj valutoj. Dank' al ĉio ĉi Ĉinio faris rimarkindan efikon en la daŭro de pli ol unu monato. Nun malleviĝis la prezo de ŝtalo, cemento k.a. kaj la konstrua gravito jam turniĝis de luksa konsumado al konstruado de la fundamentaj instaloj, kiaj energio kaj trafiko.

Faktoj montris, ke eĉ sub la cirkonstancoj de la merkata ekonomio la makroreguligo far la registaro estas nemankigebla. Sed ĉu la registaro devas administri ĉion senescepte? S-ro Dai Yuanchen tion neis. Li diris, ke en la merkatekonomia sistemo la merkato ludas bazan rolon por dispozicii la riĉfontojn kaj la registaro faras makroreguligon nur en la gravaj kampoj, kiujn la merkato ne povas regi kaj malfacile regas, kiaj la longatempa strategio de la ekonomia disvolviĝo, meza kaj longatempa planado, industriaj politikoj, starigo de la merkataj ordo kaj plano.

Ekonomikistoj opinias ankaŭ, ke kun la ŝanĝiĝo de la tradicia

**LÜ JUNWEI** kaj **XIE DECHUN**:

# La festo Nadun de tuoj

EN Ĉinio oni scias, ke "Floroj" estas festo de *tuoj*. Sed malmultaj scias, ke ankaŭ "Nadun" estas tua festo. Ĝi festiĝas ĉefe en la Huj- kaj Tu-nacia Aŭtonoma Gubernio Minghe en Qinghai-provinco.

En tiu aŭtonoma gubernio estas pli ol 32 000 tuoj. Ili tenas antikvan moron kaj apartan kulturan tradicion, al kiu apartenas la festo Nadun. "Nadun" signifas teatron en la tua lingvo. La festo Nadun en Minghe daŭras du monatojn de la dekdua de la sepa monato ĝis la dekkvina de la naŭa monato laŭ luna kalendaro ĉiujare. Festado de Nadun komenciĝas, kiam la unua prezentado de la festo okazas en la vilaĝo, kie la grenplantoj la unuaj maturiĝas. Sekve la festa

Prezentado de maska danco en la festo Nadun



prezentado okazas de vilaĝo al vilaĝo, entute pli ol 50 fojojn. La vilaĝo, kie okazas Nadun, fariĝas la centro de la festo, la vizitantoj alvenas de ĉiuj flankoj. Tuoj estas ĝentilemaj kaj gastamaj. Oni preparas tre frue bonan vinon kaj manĝaĵon por la vizitantoj. Tuoj ofte diras: "Venas gastoj, venas beno!" Tiam ĉiuj domoj gastigas siajn vizitantojn en gaja etoso.

Nadun estas populara amuza aktivado por festi riĉan rikolton. La grandioza sceno estas Huishou-danco. Ĝin partoprenas kaj maljunuloj kaj mezaĝuloj, kaj junuloj kaj infanoj. La dancantaro konsistas el dekoj da homoj, iam el centoj; la grupo de la dancantoj estas gvidata de grandaĝuloj; mezaĝuloj kaj knaboj servas kiel standardportantoj, junuloj kiel tamburo- kaj gongo-batantoj. La maljunuloj en kitelo, kun freŝaj floroj aŭ ventumilo en mano, dancas fronte, la mezaĝuloj kaj junuloj, kun nova tuko sur kapo, bunta rubando ĉe talio, diverskoloraj flagoj en mano, dancadante batas taktojn tambure kaj gonge.

La maska danco estas plej riĉa je la etna aparteco. Kun diversaj maskoj, dancantoj ekdancadas laŭ ritmo de tamburo kaj gongo. Iuj maskaj dancoj prezentas historiajn anekdotojn aŭ popolajn legendojn, kiuj temas pri solidareco kaj amikeco, forigo de malbono kaj prediko de bono por eduki junulojn. La maska danco en krudaj movoj laŭ klara ritmo puŝas la feston al kulmino de ĝojo. ■

---

planizita ekonomia sistemo al la socialisma sistemo de la merkata ekonomio, la registaro devas ŝanĝi ankaŭ siajn metodojn por la makroreguligo, t.e. la registaro devas ne plu fari rektan instrukcian regadon, sed efektivigi sian gvidon pere de ellaboro de la ekonomiaj politikoj kaj utiligo de la ekonomia vekto.

Nun oni unuanime opinias, ke la ĉi-foja makroreguligo ludos gravan rolon por akceli la reformajn paŝojn, pli rapide starigi la socialisman sistemon de la merkata ekonomio kaj garantii pri la kontinua, rapida kaj sana disvolviĝo de nia nacia ekonomio. ■

XIAO NAN:

# Pri sanprotekto de maljunuloj en Ĉinio

MI informiĝis de la Ĉina Scienca Centro de Maljuniĝo, ke la nombro de ĉinaj maljunuloj kreskas ĉiujare je 3.02% pli rapide ol tiu de la ĉina loĝantaro. En Ĉinio jam nombriĝis 103 milionoj da maljunuloj, egale al duono de la totala nombro de maljunuloj de Azio kaj al 1/5 de tiu de la tuta terglobo.

Ni prenu Ŝanhajon kiel ekzemplon. En ĝi vivas 2.05 milionoj da maljunuloj, i.a. la maljunuloj, pli-ol-80-jaraj, vidvaj, malmulte pensiataj, malsanaj kaj kriplaj kaj geedzaj paroj, vivtenantaj sin nur per salajro de edzo aŭ edzino, konsistigas 25%. 8.2% el ili bezonas monhelpon en la vivo. Tiuj problemoj sendube malhelpas al la familiana harmonio kaj socia stabileco.

Kvankam la familio, socio kaj aliaj donas helpon al maljunuloj, tamen pro malfaciloj multaj maljunuloj timas malsaniĝi. Ekz. 77-jara maljunulino Wang perdis sian edzon antaŭ longe kaj suferas de multaj malsanoj. Ŝi ne povas zorgi pri si en la vivo kaj la ekonomia stato ne permesas al ŝi dungi servistinon. Ŝia solfilo, kiu loĝas en la antaŭurbo, venas flegi ŝin tagmeze en sia ripozhoro.

Helpe de la Loĝantara Fonduso de UN, la "Enketo pri la vivtena sistemo de ĉinaj maljunuloj" estis farita de la Ĉina Scienca Centro de Maljuniĝo antaŭ nelonge. Estis la unua fojo fari tian enketon en Ĉinio. En la unua duonjaro de 1992, oni enketis pri la vivtena stato de pli ol 20 000 maljunuloj en 12 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, unu el la ĉefaj enkettemoj estis sanprotekto de maljunuloj.

La enketo montris, ke la sanaj maljunuloj, urbaj kaj kamparaj, konsistigas 38% kaj la malsanaj 21% de ĉiuj maljunuloj laŭ ilia sento. Kun kresko de aĝo, la nombro de sanaj maljunuloj reduktiĝas kaj tiu de la malsanaj grandiĝas. La sanstato de maljunuloj ĝenerale estas pli bona ol tiu de maljunulinoj. La procento de sanaj maljunuloj altas je 16% pli ol tiu de sanaj maljunulinoj.

La morbokvanto de maljunuloj en la urboj estas pli granda ol tiu en la kamparo. La nombro de malsanuloj, kiuj suferas de hipertensio, koronaria kormalsano, bronkito, pulma emfizemo, pulma-kora malsano, artrito, gastra, intesta, hepata kaj gala malsanoj, katarakto aŭ glaŭkomo, superas pli ol 10% de la urbaj maljunuloj. Tutjare laborante surkampe, la kamparanoj ĝenerale estas fortikaj. Maljuniĝante, ankaŭ ili suferas de tiuj malsanoj, tamen la malsanoj estas kompare malmultaj.

La urbaj maljunuloj pagas por kuraco kaj medikamentoj duoble

Konsultiĝo pri sanprotekto por maljunuloj



pli multe ol la maljunuloj en la kamparo. La kuraca kaj medikamenta kosto de la urbaj maljunuloj estas pagita de la ŝtato je 65%, de ili mem je 17%, de la familianoj je 15% kaj de la loĝantara organizaĵo je 0.4%, dum tiu de la maljunuloj en la kamparo estas pagita de la familio je 53%, de ili mem je 35%, de la ŝtato je 5% kaj de la loĝantara organizaĵo je 3%.

Pli ol duono de la maljunuloj en la urboj kaj kamparo opinias, ke estas oportune por ili viziti kuraciston, aĉeti medikamentojn kaj enhospitaliĝi, kaj malmultaj maljunuloj havas malfacilojn en tio. La ĉefaj malfaciloj por la lastaj estas, ke, unue, ili ne povas facile moviĝi nek legi; due, la trafiko estas malfacila kaj ekipaĵo de hospitalo nebona; kaj trie, ili ne havas sufiĉe da mono por viziti kuraciston kaj aĉeti medikamentojn. La enketo diras, ke en la urboj la plej grava problemo estas kuracaj ekipaĵoj kaj teknikoj, dum en la kamparo — ekonomia malfacilo.

La kuraca kaj medikamenta kosto por la kamparaj maljunuloj estas multe malpli alta ol tiu en la urboj, tamen la ekonomia malfacilo estas la ĉefa faktoro por la kamparaj maljunuloj en kuracado. En la kamparo ankoraŭ ne estas starigita kurac-fondusa sistemo kaj la fonto de kuraca kaj medikamenta kosto ne estas garantiata, tial la kuraca kaj medikamenta kosto de 90% de la kamparaj maljunuloj devas esti pagita de la familianoj kaj ili mem, tamen, nur 32% de la urbaj maljunuloj devas mem pagi la koston de kuracado.


Fakuloj montris, ke por solvi la malfacilojn en kuracado en la kamparo, antaŭ ĉio oni devas solvi la ekonomian malfacilon, kaj la ŝlosilo por solvi tiun problemon estas starigi kurac-fondusan sistemon. Eĉ en la urboj ankaŭ ekzistas multe da problemoj en la nuna kurac-fondusa sistemo. Sufiĉe granda parto de la maljunuloj ne ĝuas senpagan kuracadon, eĉ la ĝuantoj ne scias, kia ŝanĝiĝo atendos ilin. Kun pliiĝo de maljunuloj, altiĝas ankaŭ kuraca kaj medikamenta kosto, tio fariĝis peza ŝarĝo por la ŝtata financo kaj estas ankaŭ la plej granda problemo por la loĝantara maljuniĝo. Pro tio, ke la loĝantara maljuniĝo disvolviĝas paralele kun ekonomio kaj tekniko, des pli ĉar eĉ spertoj de multaj evoluintaj landoj pruvis, ke la kuraca fonduso ne devas kaj ankaŭ ne povas esti pura bonstatiga afero.

La urbaj maljunuloj, ĝuantaj senpagan kuracadon, nepre devas viziti difinitan hospitalon, tio kaŭzas malfacilon al iuj maljunuloj en kuracado. Tial, en la urboj la neperfekta kurac-fondusa sistemo alportas feliĉon al la maljunuloj, kaj samtempe ankaŭ multe da malfaciloj.

La efektivigo de naskolimigo reduktas la naskokvanton de la ĉina loĝantaro kaj mildigas la premon de la loĝantaro, koste de la antaŭtempa disvolviĝo de loĝantara maljuniĝo. Koncernaj personoj alvokas, ke necesas kiel eble plej rapide solvi la vivtenan problemon de la ĉinaj maljunuloj, inkluzive de ilia kuraca fonduso. Ili opinias, ke estas urĝa afero starigi kurac-fondusan sistemon en la kamparo, kaj ke nepre necesas reformi kaj perfektigi la nunan kurac-fondusan sistemon en la urboj. Tiu reformado kaj perfektigo estas ĉioampleksa kaj profundtavola. Ĝi celas ŝanĝi konceptojn, plifortigi malsano-preventon kaj sanprotekton de mezaĝuloj kaj junuloj, eĉ de knaboj kaj efektivigi la reordigon de makropolitikoj, nome starigi konvaleskajn servojn por maljunuloj, disvastigi asekuran fonduson por ili ktp. La loĝantara maljuniĝo de Ĉinio alfrontas la subdisvolviĝantan ekonomion, kio kaŭzas, ke la kuraca kaj medikamenta kosto venas ne plu el sola kanalo. Iuj fakuloj opinias, ke kiel racie distribui tian koston inter organizaĵoj, familioj kaj individuoj estas unu el la rimedoj solvi la kurac-fondusan problemon por la maljunuloj.

Spertinte 14-jaran provadon kaj reformadon, la ĉina kuraca kaj higiena afero multe progresis. Ekz. en nemalmultaj urboj laboras hospitaloj kaj kuracejoj funkciigataj de entreprenoj aŭ individuoj. Funkciigado de hospitaloj per pluraj kanaloj multe faciligas al la pacientoj ricevi kuracadon. En la kamparo perfektiĝas la sanprotekta reto de tri niveloj, nome, de gubernio, subdistrikto kaj vilaĝo kaj praktikiĝas specialaj servoj, ekz. fari registron kaj aĉeti medikamentojn por malsanuloj. Tiuj servoj sendube faciligas al ili. ■

Korpo-ekzameno por maljunuloj



DING RENREN:

# Urĝa savo sur glaciejo

EN la unuaj tagoj de julio, ĉe montpiedo de Ĉomolangma, la glacio degelis en sunlumoj.

La 4-an de julio, la scienca ekspedicio el 15 ĉinoj kaj norvegoj fondis ĉefstabejon en la templo Rongbu (Ĵongbu), 5 000 m alta super la marnivelo ĉe la montpiedo de Ĉomolangma. Post ripozo, Qin Dahe (Ĉin Dahe), ekspediciestro de la ĉinaj sciencistoj-alpistoj, lia esplor-studento s-ro Hou Shugui, norvega sciencisto s-ro Tul kaj 4 tibetaj laboristoj direktis sin al la glacirivero Orienta Rongbu 6 500 m super la marnivelo, pelante 10 gruntbovojn en la tagmezo de la 7-a de julio. Tie ili kolektos glacian specimenon por scienca esplorado. Laŭ la plano ili devis returni sin post 4 tagoj.

Qin Dahe estas glaciologo kaj vicestro de la Lanzhou(Lanĝoŭ)-a Instituto de Glacirivero sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li iam piediris trans la Antarkton por scienca esplorado.

La 8-an de julio ili grimpis sur la monton 6 080 m super la marnivelo kaj kampadis sur montdeklivo. En tiu nokto s-ro Qin ne bone dormis pro kapdoloro.

Antaŭe s-ro Qin plurfoje surgrimpis montpintojn pli ol 5 000 m altajn super la marnivelo por scienca esplorado. Li, 48-jara, estas sperta en scienca esplorado kaj tre eltenema al altaj montoj. Li estas serioza en la laborado, sed ĉi-foje li ne povis ne resti en la tendo 6 080 m alta super la marnivelo pro sia malbona farto kaj lasi s-ron Hou kaj aliajn daŭrigi la grimpadon por kolekti glaciajn specimenojn de la loko 6 500 m alta super la marnivelo.

En la nokto de la 9-a de julio, pli akra kapdoloro atakis s-ron Qin, kiu suferis ankaŭ de iluzioj kaj ne povis distingi la tagon disde la nokto. Tio estis simptomoj de cerba edemo kaŭzita de alpa malsano. La malsano minacis lian vivon.

La 10-an, tuj ĉe la tagiĝo, s-ro Tul kaj iu tibeta laboristo malsuprengrimpis por raporti la staton de s-ro Qin.

En tiu tago s-ro Wang Wei (Ŭang Ŭej), alia respondeculo de la ekspedicio, atendis kun sia aŭto ĉe la montpasejo por veturigi Qin Dahe kaj liajn kolegojn al la ĉefstabejo. Informiĝinte pri la malsano de Qin, li tuj konsciiĝis, ke estas ege malfacile malsuprenigi la malsanulon de la Orienta Rongbu-glacirivero 6 080 m super la marnivelo. Li senprokraste kontaktiĝis kun s-ro John, estro de la usona alpisma teamo, kiu tie preparis sin por grimpi Ĉomolangma, por peti lian helpon. S-ro John tuj konsentis kaj proponis, ke oni serĉu du ĉevalojn por porti Qin malsupren.

Tiam falis la vespera krepusko. Ĉu oni povos surgrimpi la monton en la nokto? Wang Wei konsultis tibetanon Dengji. La lasta demandis pri la sanstato de Qin kaj kategorie respondis, ke jes. Ĉar oni malsukcesis trovi ĉevalon, tial Dengji proponis malsuprenigi s-ron Qin per brankardo, tiamaniere 4 tibetanoj, inkl. de Dengji, tuj preparis sin por grimpi sur la monton en la nokto.

Informiĝinte pri la nokta montogrimpado, John tuj kunportis simplan premkajuton kaj medikamentojn por urĝa savado kaj enviciĝis inter la savantoj. Iris kune kun li ankaŭ lia nepala helpanto.

Post foriro de Tul, s-ro Qin falis en duonkomaton, pro la forta alpa malsano lin doloris liaj internaj organoj. Li foje kaj refoje demetis siajn vestojn kaj lia helpanto s-ro Hou foje kaj refoje surmetis por li, tamen la fortaj ultraviolaj radioj senkompate prilumis lin kaj de tio lia haŭto sur la brusto kaj ventro multe defalis.

La klimato ĉe Ĉomolangma estas kaprica. Ĵus regas tute serena tago, post momento jam blovas ventego kaj ekflirtas neĝflokoj. S-ro Hou kalkulis, ke Tul bezonas unu tagon por malsupreniri kaj almenaŭ unu tagon por iri supren, tial la savantoj atingos almenaŭ post 2 tagoj. Li petis la restantajn tibetanojn firmigi la tendon kaj mem tenis Qin en sia sino kaj laŭeble nutris lin.

Falis obskura nokto. Falis ankaŭ neĝglacio, de tio la montvojo, antaŭe tre malglata, fariĝis multe pli malfacila por la grimpantoj.

Je la 3-a horo de la 11-a, Hou aŭdis, ke iu frapis je la pordo de la tendo. Ekster sia atendo li vidis, ke usona ekspediciestro s-ro John staras tuj antaŭ la pordo. Plena de ekscitiĝo, Hou volis diri al li dankajn vortojn, sed li svingis la manon kaj tuj demandis pri la malsano de s-ro Qin. Informiĝinte, ke s-ro Qin vere suferas de cerba edemo, li senprokraste injektis al li kaj portis lin en premkajuton por urĝa savo...

Dum la 3 tagoj s-ro Qin unuafoje fermis siajn okulojn por dormo. Dengji persistis ĝis la tagiĝo por plimultigi oksigenon en la premkajuto per aerpumpilo. John laŭdis, ke Dengji faris "la unuan meriton" por savi s-ron Qin.

Je la 7-a horo s-ro John ordonis, ke oni ligu s-ron Qin al brankardo por iri malsupren.

En la lokoj pli ol 5 600 m altaj

super la marnivelo ili malsupren iris laŭ kruta glacirivero. Kiam la vojo estis kompare larĝa, la brankardon tenis 4 homoj, kaj kiam la vojo fariĝis mallarĝa, la antaŭiranto do ligis la brankardon sur sia talio, dum la malantaŭiranto pendigis ĝin sur sia kolo. Oni helpis unu alian kaj moviĝis malsupren centimetron post centimetro. De la 7-a ĝis la 15-a horo, oni malsupreniĝis nur je 100 metroj.

Malsupre de la loko 5 600 m alta super la marnivelo la glacia vojo fariĝis multe pli malfacila por irado, ĉar ĝi pleniĝis de frosta glacia akvo. S-ro Hou kaj tibetaj laborantoj, tenante la brankardon, iris en la glacia akvo. Super la valo leviĝis kantokriado de la brankardtenantoj jen laŭta, jen mallaŭta.

Survoje John foje kaj foje levis la palpebrojn de Qin por ririgardi ties pupilojn kaj en ripozo injektis al li.

Hou rimarkis, ke antaŭe ĉiufoje, kiam John faris injekton al Qin, li forĵetis la injektilon, sed en la lastaj du fojoj li restigis ĉe si la injektilojn. Hou do demandis, kial li tion faras. John, sperta alpisto, kiu 4-foje surgrimpis Ĉomolangma, respondis, ke Qin eble ne saviĝos. Li rezervis la injektilojn por memoro pri savo de Qin kaj nun la saviĝo sukcesos aŭ ne, tion decidos nur Qin mem.

Hou do kliniĝis super Qin kaj forte lin skuadis. Se tiu ne vekiĝis, li do frapis ties vangojn. Kiam Qin malfermis siajn okulojn, Hou do laŭte kriis al li: "Estu kuraĝa! Eltenu! Vi ja havas edzinon kaj filon. Ili atendas vin! Vi havas ankoraŭ multajn farendajn aferojn! Vi nepre devas elteni tion! Alie, vi vanigos la esperon de ĉiuj viaj savantoj! Aŭskultu, jen ili krias!"

La kriado ŝvebis en la profunda montvalo...

Survoje ili renkontis usonan alpiston Jim, kiu memvole grimpis supren por partopreni la savadon, kaj aliajn savantojn.

Ĉe la noktiĝo falis glacieroj. La 8-grada ventego stumbligis ĉiujn piedirantojn. Oni jam ne memoris, kiom longe ili iris. Feliĉe, ke ili vidis lamplumojn de la aŭto, kiu ilin atendis ĉe la montpiedo. Pasis aliaj 3 horoj. Tiam jam batis la 23-a horo de la 11-a de julio.


Ĉe la montpiedo oni atendis ilin jam 15 horojn en neĝo kaj frosta vento. Kiam venis la brankardo de Qin, ŝoforo tuj veturigis lin al Xigaze. En 13 horoj la aŭto veturis 400 km sur malglata montvojo kaj transiris 2 altajn montojn pli ol 5 000 m super la marnivelo kaj finfine enhospitaligis s-ron Qin.


Post urĝa savado s-ro Qin estis savita. La doktoro diris, ke se oni ne urĝe savus Qin per premkajuto en la loko 6 000 m alta super la marnivelo, kaj se oni sendus la malsanulon en la hospitalon pli malfrue je 3 horoj, la hospitalo ne sukcesus savi lin el la danĝero.

Qin Dahe ne falis. Tiun miraklon kreis la ĉinaj, norvega, usonaj alpistoj kaj tibetaj laborantoj kune. ■

### Solvoj por testo de inteligenteco

1. Almenaŭ kvar gantoj.
2. Bildo por Ŝovelilo kaj Pasteĉo
3. Bildo por Grandigo de Lageto



## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1994

| Lando | Valuto | Abonprezo | Sendkosto | Totalo |
|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | AUD | 19,00 | 16,00 | 35,00 |
| Aŭstrio | ATS | 192,00 | 128,00 | 320,00 |
| Belgio | BEF | 575,00 | 375,00 | 950,00 |
| Britio | GBP | 10,00 | 6,00 | 16,00 |
| Germanio | DEM | 28,00 | 18,00 | 46,00 |
| Finnlando | FIM | 61,00 | 50,00 | 111,00 |
| Francio | FRF | 88,00 | 62,00 | 150,00 |
| Israelo | USD | 14,00 | 12,00 | 26,00 |
| Italio | ITL | 20200,00 | 13800,00 | 34000,00 |
| Japanio | JPY | | | 4200,00 |
| Kanado | CAD | 17,00 | 15,00 | 32,00 |
| Nederlando | NLG | 28,00 | 23,00 | 51,00 |
| Nov-Zelando | NZD | 26,00 | 22,00 | 48,00 |
| Svisio | CHF | 23,00 | 17,00 | 40,00 |
| Usono | USD | 14,00 | 12,00 | 26,00 |
| TARIFO A | USD | 14,00 | 12,00 | 26,00 |
| TARIFO B | USD | | | 15,00 |
| TARIFO C | USD | | | 10,00 |

| | |
|---|---|
| TARIFO A: | Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C. |
| TARIFO B: | Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko. |
| TARIFO C: | Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Latvio, Litovio, Estonio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre. |

LI ZHIZENG:

# Koliero el sorga tigo (Novelo)

TIAM Fang estis tre malriĉa, ke eĉ malsata muso ne volis eniri en lian domon. Kvankam Fang estis tre bela, tamen tro malriĉa, kaj li restis fraŭlo ĝis la aĝo de 28 jaroj.

Kiam li estis 29-jara, oni svatis al li knabinon Min. Ŝi aĝis malpli ol 20 jarojn, maldika, sed beleta. Ŝi ŝatis lin pro lia vira beleco. Ankaŭ Min estis malriĉa, ŝi ne rifuzis lin pro lia malriĉeco. Ŝi diris, ke ankaŭ malriĉuloj devas vivi.

Ili enamiĝis. La laborema Fang ofte iris al Min por helpi ŝin en laboro kaj post laboro li ŝtele tiris ŝin al riverbordo.

Min aŭdis, ke virinoj en urboj portas oran kolieron rebrilantan; kaj Fang diris, ke li vidis tion en bildlibro. Rigardante ŝian longetan kolon, li pensis, ke ŝi aspektos plí ĉarme, se ŝi havos sur si kolieron. Li promesis fari por ŝi kolieron.

Reveninte hejmen, Fang cerbumadis pri la promeso. Subite li rimarkis du garbojn da sorgaj tigoj starantajn en la korto. Post momenta medito liaj okuloj ekbrilis de ĝojo.


Li derompis la suprajn partojn de la sorgaj tigoj, purigis ilin kaj tranĉis ilin en mallongajn pecojn. Li petis de la elementa lernejo kelke da koloraj kretoj, pulvorigis ilin kaj kolorigis la tigopecojn per la pulvoro. Poste li petis de najbara lignaĵisto iom da verniso por briligi ilin. Post sekiĝo de la verniso li traigis ruĝan fadenon tra ili. Jen pretigita multkolora koliero. Li metis ĝin sur sin kaj rigardis sin en malnova spegulo. Kun ĝoja krigo li sin pafis el la domo.

Li donis la kolieron al Min kaj Min montris ekstreman ĝojon. Fang esperis, ke la tigoj estos oraj, kaj ankaŭ la koliero ora.

Fang kaj Min geedziĝis. Malgraŭ malriĉeco ili vivis dolĉe. Min diris, ke oni povas kantante vivi en malriĉeco, kaj eblas ankaŭ, ke oni plorante vivas en riĉeco.

Post la edziniĝo ŝi ne plu portis sur si la kolieron kaj pendigis ĝin sur argila muro. Sed ŝi ĉiam sentis agrablan tiklon en la koro, kiam ŝi ĵetis rigardon al ĝi.

Poste ili havis infanon. Fang lerte faris luksaĵetojn el sorgaj tigoj por kolporti ilin en la urbo. Liaj metiartaĵoj estis tre bonvenaj en la urbo. Poste li fondis metiejon kaj varbis kelke da virinoj. Min restis hejme por prizorgi la infanon. Fang gajnis cer-



# Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluintaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendenpendaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu aboni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprenemon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monoferu al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sendi monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

**La Red.**

tan sumon da mono kaj intencis anstataŭigi sian teran kabanon per brika duetaĝa domo. Antaŭ ol malkonstrui la kabanon, Min deprenis la kolieron de sur la muro kaj zorge konservis ĝin. Kiam la nova domo estis konstruita, ŝi denove pendigis la kolieron sur la muro tapetita per plasto. Sed Fang opiniis, ke tie devas esti murtapiŝo, kaj ĵetis la kolieron en la rubujon. Kiam Min sciiĝis pri tio kaj retrovis ĝin en la rubujo, la koliero jam tute ŝanĝiĝis en aspekto. Fang diris: "For la malnova! Mi aĉetos por vi oran kolieron."

Tenante la disrompitan kolieron, Min sentis, ke ŝia koro estas pikita.

Pro sia okupiteco en la metiejo Fang ne povis ofte reveni hejmen. Li ne estis societema kaj elektis unu el la laboristinoj kiel sekretariinon por interentreprenaj rilatoj. Ŝi estis tre ĉarma kaj dancis bone. Ŝi estis saĝa kaj kompetenta. Ŝi trovis multajn merkatojn. Fang tre ŝatis ŝin kaj ekhavis intiman rilaton kun ŝi. Poste iliaj interrilatoj fariĝis paroltemo de la samvilaĝanoj. Sed Fang ignoris la straban rigardon de la samvilaĝanoj, kaj la sekretariino agis aŭdace. Ili aperadis ĉiam duope.

Fang rememoris Min, nur kiam li faris aĉeton en butiko de oraĵoj. Li aĉetis oran kolieron por la sekretariino kaj, kiam li vidis la belulinon kontente surmeti la kolieron, li rememoris Min kaj ankaŭ la sorgotigan kolieron kaj la promeson pri ora koliero. Li falis en mediton. Li eskortis la sekretariinon en la hotelon, reiris en la butikon kaj aĉetis oran kolieron. Li haste veturis hejmen per sia aŭtomobilo "Santana".

Enpaŝante en la domon, li vidis, ke Min sidas malvigle kun la disrompita koliero en la mano. Je hezito Fang prezentis al Min la oran kolieron kaj diris: "Min, ĝi estas el pura oro!"

Sed Min ne akceptis ĝin. Fikse rigardante la brilantan oran kolieron, ŝi diris ŝajne al si mem: "Mi esperegas, ke ĝi estos el sorga tigo..."

Subite ŝi ekridis, sed baldaŭ ekploris... ■

CHAI BING kaj ZHU JIFA:

# Profunda amo

MATENE de la 1-a de junio 1993, ĉe la piedo de la pitoreska Daliang-monto de Ninghai en orienta Ĉinio haltis la ruĝa aŭtomobilo "Santana", el kiu eliris altastatura maljunulo el Rejnlando.

Li, kvankam pli-ol-70-jara, estis fortika. Descendinte de la aŭtomobilo, li iris rekte al la Daliangshan-a Bierfarejo. De 1990 li 5-foje venis tien.

La maljunulo nomiĝas Willi ABT. Li estas bierfaristo de Homburg, Germanio, regno de biero. Ĉiujare s-ro Willi ABT venas al Ĉinio por labori kelkan tempon. Germana ĵurnalo titolis lin bierambasadoro.

Kiel majstro, s-ro Willi ABT helpis pli ol 20 bierfarejojn de Ĉinio en 7 jaroj. Li plurfoje venis al la Daliangshan-a Bierfarejo kaj restis tie pli longe. Li estis invitita kiel speciala konsilanto de la bierfarejo. Kial li portas profundan amon al la Daliangshan-a Bierfarejo?

Somere de 1990, li estis invitita al la Ningbo-a Bierfarejo kiel teknika direktanto. La Daliangshan-a Bierfarejo informiĝis pri tio kaj insistis "pruntepreni" la alilandan majstron por 7 tagoj. Kvankam la biero Daliangshan gajnis la oran medalon de la Unua Ĉina Manĝaĵa Foiro, tamen por plue plibonigi la kvaliton kaj trovi merkaton en la mondo, la Daliangshan-a Bierfarejo devis daŭre rebonigi siajn ekipaĵojn. Kompreneble, ĝi neniel povis malkapti la ŝancon inviti la majstran bierfariston.

Inspektinte la ekipaĵojn de la bierfarejo, s-ro Willi ABT proponis anstataŭigi la ferajn filtrilojn kaj distililojn per la ŝtalaj. Tio helpos plibonigi la kvaliton kaj plialtigi la produktokvanton.

Tiucele, la Daliangshan-a Bierfarejo investis 10 milionojn da juanoj por fari teknikan reformadon kaj aĉeti avangardajn ekipaĵojn. Dank' al tio, la jara produktokvanto de biero kreskis de 10 mil tunoj al 20 mil tunoj kaj la kvalito de biero pliboniĝis.

Somere de la sekvanta jaro, li refoje vizitis la Daliangshan-an Bierfarejon. Vidinte renovigitajn ekipaĵojn, li tre ĝojiĝis kaj donacis al la bierfarejo du fajnajn biergistojn. Krome, li ankaŭ funkciigis kurson por trejni laboristojn kaj doni pli avangardajn teknikojn. Li restis 42 tagojn en la bierfarejo.

Neforgesebla estis la 28-a de junio 1992. Tiutage la Daliangshan-a Bierfarejo donis festenon por festi la 70-an datrevenon de la naskiĝo de s-ro Willi ABT. La gvidantoj de la bierfarejo donacis al ges-roj Willi metiartaĵon kun desegno de pino kaj gruo, kiuj simbolas longvivecon en la okuloj de la ĉinoj. En la varma atmosfero s-ro Willi ABT, kunfrapante la manojn, kantis "Kanto de Naskiĝtago" kaj "Kanto de Biero".

De la pasintaj jaroj s-ro Willi ABT multe helpis al la Daliangshan-a Bierfarejo. Li varme direktas laboristojn en la produktado kaj ĉiujare donas al ĝi du fajnajn biergistojn preparitajn de li mem.

La penadon de s-ro Willi ABT rekompencis la sukceso. En 1992 la produktokvanto de la bierfarejo

S-ro Willi ABT (meze) kaj gvidantoj de la bierfarejo



LI ZHONGFA:

# Forigu rubon en la spaco

MALMULTAS pura tero sur la terglobo kaj multas rubo en la spaco. Ne nur ekologoj, sed ankaŭ fakuloj pri kosmonaŭtiko krias pri ruboforigo.

Same kiel sur la tero, ankaŭ en la spaco rubo multiĝas tago post tago. De post 1957, kiam Sovetunio lanĉis la unuan artan sateliton, pli kaj pli multiĝis en la spaco malfunkciintaj satelitoj, restaĵoj de brulinta raketo kaj instrumentoj perditaj de kosmonaŭtoj, kio formis danĝeran rubo-zonon ĉirkaŭ la terglobo. La rubo serioze minacas la astronaŭtikon de la homaro, ke la nove lanĉitaj satelitoj kaj spaconavetoj povas kolizii kun ĝi.

Oni kalkulis, ke en la spaco estas pli ol 7 000 objektoj en grandeco de tenispilko, 100 000 malgrandaj rompitaĵoj kaj 3.5 milionoj da pecetoj en diametro de malpli ol 1 cm. Pli ol 95% de la rubo estis produktitaj de Sovetunio kaj Usono.

De la 5-a ĝis la 7-a de aprilo 1993 la Unua Eŭropa Konferenco pri Spaca Rubo okazis en la surtera regada centro de Darmstadt en Germanio. La ĉeestantaj fakuloj unuanime opiniis, ke la rezulto estos netolerebla, se en la venonta astronavigado oni daŭre produktos rubon. En la pasintaj jaroj jam aperis danĝero, ke naviganta spaconaveto preskaŭ koliziis kun rubo. En 1983 spaca rubo difektis la ŝelojn de homportaj spaconavetoj de Usono kaj Sovetunio. En 1991 usona spaconaveto estis devigita ŝanĝi sian navigvojon laŭ la surtera ordono por ne kunpuŝiĝi kun kosmoŝipo.

La rubo en la spaco konsistas plejparte el rompitaĵoj de eluzitaj raketoj aŭ de eksplodintaj piloj. Tial fakuloj opinias, ke regi la ellason de karburaĵo restanta en raketo por eviti "eksplodan efikon" estas taŭga metodo por malpliigi spacan rubon.

Kion fari, se tio ankoraŭ ne povos efike evitigi rubon en la spaco? Sciencistoj supozis, ke oni povus faligi spacan rubon per atako de laserradioj sur la "spaca ruboĉaro", aŭ repreni la spacan rubon per "rubo englutanta sateliton". Tamen la supozoj estas preskaŭ scienca fantazio. ■

---

atingis 30 mil tunojn kaj la kvalito de la biero pliboniĝis. La bierfarejo gajnis la oran medalon de la Unua Bankoka Internacia Foiro de Famaj Vinoj.

Ĉi-foje s-ro Willi ABT restis en la Daliangshan-a Bierfarejo kvin tagojn. Li estis rigora al la laboristoj de la bierfarejo kaj ofte kontrolis, ĉu ili faras laŭ liaj postuloj, ĉu la ĉenlaboro iras laŭ la difinitaj normoj kaj ĉu la kvalito estas stabila. Se ne, li donis demonstradon. Dum la restado li ellaboris por la bierfarejo projekton por reformi sakarizon kaj fermentadon...

Ĉi-jare la Daliangshan-a Bierfarejo, la unua el la enlandaj bierentreprenoj, produktis nigrarizan bieron, kiu enhavas 18 specojn da aminoacidoj. Gustumante bieron, s-ro Willi ABT multe admiris ĝin kaj proponis enmeti en la bieron tonikajn drogherbojn, kiaj ĉina angeliko, licio kaj kardamomo, por ke la biero fariĝu pli nutroriĉa kaj pli saniga. Li propramane dozis kaj dekoktis la drogherbojn. La nigrariza biero preparita de li estas pli gustoplena. De junio ĝi jam vendiĝas en merkato. ■

## EKONOMIO

● En la unua duono de 1993 Ĉinio produktis sur la ĉeftero 68.98 milionojn da tunoj da nafto kaj 7.63 miliardojn da kubmetroj da natura gaso.

Laŭ informo, Ĉinio paŝo post paŝo malfermos la prezaron de nafto kaj natura gaso kaj proksimigos ĝin al la internacia prezaro. En la pasintaj jaroj, por ke la petrolaj entreprenoj iru sur la merkaton, Ĉinio malgrandigis la parton vendotan laŭ kliento, kvanto kaj prezo difinitaj de la ŝtato kaj permesis al la entreprenoj vendi petrolon kaj naturan gason produktitajn ekster la difinita tasko kaj ŝparitan petrolon de ili mem laŭ la prezo sur la merkato.

● Dekkelkajn jarojn post la ekpraktiko de la familia respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado en la ĉina kamparo, aperis en Wuxi (Uŝji) de Jiangsu(Ĝjangsu)-provinco 580 vilaĝaj kultivejoj kaj la totala areo de kampoj konsistigas 64 procentojn de la kampoj en la tuta gubernio.

La vilaĝaj kultivejoj praktikas sendependan administradon kaj memfinancadon, kio faciligas solvi la malfacilaĵojn, kiaj disa kultivado, malalta nivelo de mekanizado, malgranda kapablo rezisti kontraŭ naturaj katastrofoj kaj tre malrapida popularigo de modernaj sciencoj. Tial la kultivejoj estas tre ŝatataj de la kamparanoj.


● En Ĉinio estas 170 000 pontoj, kaj la tekniko de konstruado de ŝosea ponto atingis mondan nivelon.

Antaŭ 40 jaroj super Yangzi-rivero estis nur 2 pontoj kaj nun estas 24, kaj super la Flava Rivero estas 50 ŝoseaj pontoj. La arkitekturo de arkoponto ankoraŭ estas vivipova en la nuna Ĉinio. En 1990, en Fenghuang-gubernio de Hunan oni konstruis ŝtonan arkoponton kun spano de 120 metroj kaj per tio starigis rekordon pri longo de spano de arkoponto. En valoj kaj super grandaj riveroj oni konstruis pli ol 20 stajajn pontojn, tiel ke Ĉinio fariĝis lando kun plej multaj stajaj pontoj en la mondo.

● En Ĉinio oni bredas 7.541 milionojn da esamenoj da abeloj kaj produktas ĉiujare mil tunojn da mielo kaj abelreĝina gelateno.

## SOCIO

● En la pasintaj jaroj Ĉinio gajnis rimarkindajn sukcesojn en helpo al malriĉaj lokoj. La nombro de homoj, kies vivnivelo estas sub la minimuma normo, malkreskis de 250 milionoj en 1978 al 80 milionoj en 1992 kaj la pocento de malriĉuloj en la kamparo — de 31.1 en 1978 al 8.8 en 1992. En la 331 gubernioj subvenciataj de la ŝtato, la meznombra enspezo de ĉiu kamparano kreskis de 208 juanoj en 1985 al 450 juanoj en 1992. Se dekalkuli la parton pliigitan pro prezaltiĝo, la neta enspezo altiĝis je 133.8 juanoj. La meznombra enspezo de la kamparanoj en 13 el la gubernioj estis 780 juanoj, egale al tiu de la kamparanoj de Ĉinio.



Ŝtona arkoponto en Fenghuang-gubernio

● Advokataj agentejoj de Usono, Britio kaj Francio establis en Pekino ok filiojn, kies laboro inkluzivas konsultiĝon pri leĝo, konvencio, internacia komerca leĝo kaj aliaj; plenumon de leĝaj aferoj komisiitaj de kaj al ĉinaj advokataj agentejoj.

● Antaŭ nelonge oni trovis en Taojiang-(Taŭĝjang)-gubernio de Hunan longevivan familion. La plej aĝa en ĝi estas 103-jara maljunulino. Ŝi

havas tri filojn kaj unu filinon. La unua filo aĝas 84 jarojn, la filino 81 jarojn, la dua filo 80 jarojn kaj la tria 68 jarojn. La gefiloj fartas bone, ankaŭ la bofilo kaj bofilinoj estas sanaj.

● Ĝis aŭgusto 13.2 milionoj da hektaroj da kampoj de Ĉinio estis atakitaj de trosekeco kaj inundo. Inter ili 11.5 milionoj da hektaroj da kampoj estis inunditaj. La provincoj Hunan, Jiangxi (Ĝjangŝji), Shandong kaj Sichuan estis plej serioze plagitaj.

● La ĉina lingvo vekas intereson ĉe pli kaj pli multaj homoj en la mondo. Pli ol 1 000 lernejoj en 60 landoj donas ĉinlingvan lecionon, kaj multaj altaj lernejoj havas ĉinlingvan fakultaton. Ĉiujare ĉ. 14 000 alilandanoj venas al Ĉinio por lerni la ĉinan lingvon.

## MEDICINO

● Insulino estas la plej efika medikamento kontraŭ diabeto. Antaŭe Ĉinio ricevis insulinon el pankreato de porko aŭ bovo. Antaŭ nelonge ĉinaj sciencistoj ricevis insulinon per geno-inĝenieria metodo. La pureco kaj medikamenta aktiveco atingis la internacian normon, kaj la produktokosto estas duono de tiu de rekta ekstrakto el besta pankreato.

Antaŭe en la mondo nur Usono kaj Danlando povis elfari insulinon per geno-inĝenieria metodo.

● La Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo, kiu sukcesis replanti derompitan manon antaŭ 30 jaroj, refoje sukcesis replanti ambaŭ derompitajn krurojn. Antaŭ nelonge, ses junaj kirurgoj de la hospitalo replantis ambaŭ derompitajn krurojn al maljuna kamparano. Tio estis unuafoja en la mondo.

## TURISMO

● En la unua duono de 1993 pli ol 20 milionoj da alilandanoj vojaĝis al Ĉinio, dank' al kio Ĉinio enspezis 2.11 miliardojn da usonaj dolaroj. La nombro de la turistoj kaj la enspezo pliiĝis respektive je 9.8% kaj 23.2%, kompare kun tiuj de la sama periodo de 1992.

Septembro kaj oktobro estas ĉefsezono por turismo de Ĉinio, kaj espereble Ĉinio enspezos ankoraŭ 2.5 miliardojn da usonaj dolaroj ĝis la fino de 1993. Tiel la totala sumo estos pli granda ol tiu de 1992 je miliardo da usonaj dolaroj.

## SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Antaŭ nelonge s-ro Yuan Longping, estro de la Centro de Riza Hibridigo de Hunan, gajnis la usonan malsato-premion donitan de la usona Brown-universitato por honori elstarajn kontribuantojn por disvolvado de grena produktado.

La hibridigita rizo de Yuan kaj liaj kolegoj estas kulturata en Usono, Japanio, Italio, Filipinoj, Hindio, Vjetnamio kaj Koreio. Statistiko de la Grena-Agrikultura Programo de UN raportas, ke la areo por hibridigita rizo de la mondo konsistigas 10% de la totala areo de rizkampoj kaj la produktokvanto egalas al 20% de la totala produktokvanto de rizo en la mondo.


S-ro Yuan Longping (maldekstre)

## ARKEOLOGIO

● Ĉinaj arkeologoj trovis en antikva tombo spadon kurbigitan sub la premo de tero antaŭ 1 700 jaroj. Sed kiam oni elterigis ĝin, la rusta spado tuj rektiĝis. Kredeble, tio okazis neniam antaŭe en prifosado de antikvaj ĉinaj armiloj.

## ĈINAJ KAMPARANOJ KOMERCAS EN ALIAJ LANDOJ

Iuj el la ĉinaj kamparanoj, kiuj komencis sian karieron per fondo de entreprenoj en siaj hejmlokoj, nun komercas en aliaj landoj. Kamparanoj de Huangyan, Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco kun siaj novaj plastblovaj ekipaĵoj kaj teknologioj iris al la Sudorienta Azio por havi novan disvolviĝon al sia afero. La unua translanda kompanio de la ĉina kosmetikaĵa industrio estas fondita de Kemiindustria Fabriko de Ĉiutagaj Necesaĵoj Xiafei, vilaĝa entrepreno de la antaŭurbo de Ŝanhajo. En Rusio kaj aliaj najbaraj landoj de Ĉinio ĉie renkontiĝas komercantaj kamparanoj el Zhejiang.

En la lastaj jaroj ĉiujare granda nombro da kamparanoj de Qingtian-gubernio de Zhejiang kun originalaj teknikoj veturis al la Okcidenta Eŭropo. La konstru-grupo el kamparanoj kaj lignogravuristoj-kamparanoj de la urbo Dongyang konata kiel "centmetia vilaĝo" ĝuas prestiĝon en la internacia konstrua merkato de la mez-orientaj landoj. Kamparanoj de Shandong, kiuj antaŭe migris al la tri provincoj de nordorienta Ĉinio por perlabori, nun, tra nordorienta Ĉinio veturis al Rusio por terkulturado. Ili arope veturis al Rusio kaj tie luis parcelon por kulturi legomojn. La agrikultura departemento de Xinjiang (Ŝinĝjang) ekfunkciis kiel peranto por la kamparanoj, kiuj volas laŭkontrakte lui teron en aliaj landoj. Oni humure diris: "Internaciiĝis la ĉina familia respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado."

Ankaŭ iuj bonhaviĝintaj vilaĝoj komencis direkti sian atenton al la internacia merkato. Xinqiao-(Ŝinĉjaŭ)-vilaĝo de la urbo Yantai en Shandong luis per 1 570 000 juanoj parcelon de 10 000 kvadrataj metroj kun uzrajto por 50 jaroj en la urbocentro de Blagoveshensk en Rusio kaj tie konstruis sintezan negocejon.

## KULTURA KONSUMO ESTAS ATENTATA

Shandong-provinco estas unu el la ekonomie rapide disvolviĝantaj marbordaj regionoj. En la unuaj tri monatoj de 1993 la pokapa meznombra elspezo por kultura kaj eduka aferoj estis 46.45 juanoj, je 34.2% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1992.

En la lastaj jaroj loĝantoj de la provinco ekatentis pri kultura konsumo, sed antaŭe pri grandaj daŭremaj konsumaĵoj. La averaĝa eduka elspezo por ĉiu loĝanto estis 16.42 juanoj, je 83.9% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1992. La kaŭzo kuŝas jene, unuflanke, la plua studado de infanoj de iuj familioj pliigas la elspezon. Krome, la elspezo multe pliiĝas por studentoj je sia propra pago, familia instruisto k.a. Multaj laboristoj kaj oficistoj por altigi sian kleritecon vizitas korespondan universitaton. En la unua trimestro ĉi-jare ĉiu loĝanto elspezis po 11.12 juanojn. Aliflanke, oni pli kaj pli alte taksas klerigan edukadon por sia infano, senĉese kreskas la nombro de infanoj vizitantaj infanĝardenon, iuj familioj pagas por la infano por diversaj kursoj.

Apero de diversaj distrejoj, kiaj karaokejo, elektronika ludejo kaj amuzejo, riĉigis la postlaboran vivon de la loĝantoj. Laŭ statistiko, en la unua trimestro ĉi-jare ĉiu loĝanto elspezis po 2.19 juanojn por amuzo kaj po 2.48 juanojn por trafiko, je 47% kaj 40.1% respektive pli multe ol tiuj en la sama periodo de 1992.

En la kultura konsumo de Shandong-aj loĝantoj aperis iuj ĝojindaj fenomenoj, tamen ankaŭ ekzistas multe da problemoj. Unue, estis kompare malalta la elspezo por libroj, gazetoj kaj revuoj. Due, la kulturaj kaj amuzaj instalaĵoj ne povas kontentigi la bezonon de la loĝantoj, tial oni devas rapidigi la konstruajn paŝojn por tiuj instalaĵoj.

## HISTORIO DE TOŬFUO

Historiaj materialoj diras, ke la ĉina toŭfuo originis en Bagongshan de Anhui-provinco.

La materialoj kaj farado de la toŭfuo de Bagongshan estas rafinitaj. Ĝi estas farita laŭ rigora procedo, per font-akvo, el delikate muelitaj sojfaboj tute sen feĉoj. Tial la toŭfuo de Bagongshan estas aparte blanka, delikata kaj bongusta.

Toŭfuo estas vaste produktata en Ĉinio kun abundo da specoj kaj estas laŭdata de instruituloj de diversaj dinastioj. En Qing-dinastio (1616-1911) foje la imperiestro Kangxi inspektis en la sudo, li ordonis sian kuiriston lernigi la faradon de toŭfuo.

En Ming-dinastio (1368-1644) ĉina toŭfuo jam diskoniĝis en aliaj landoj. Post la Dua Mondmilito la ĉinaj restoracioj en Usono, Britio, Francio, Japanio kaj diversaj lokoj de la Sudorienta Azio, ĉiuj vendas famajn pladojn el toŭfuo. Nun, la ĉina toŭfuo jam estas ĝenerale konata de la mondo kiel saniga manĝaĵo.


## FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



Ortodoksa preĝejo en Karlovy Vary, Ĉeĥio
de **WALTER ULLMANN** (Germanio)

Strateto en vilaĝo de norda Nederlando de **MARIËT HOOGELAND** (Nederlando)





Huangshan-monto en aŭtuno Foto de **LIU SIGONG**

KUL

世界语《中国报道》一九九三年第十二期（本刊代号：二——九一五）国内统一刊号：CN11 1339／G2